

89-a jaro • n-ro 1080 (4) • aprilo 1996

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



Tria Amerika Kongreso

Ĉu rizesperantistoj?

**Bosnio atendas
E-projektojn**

**Zsuzsa Polgár:
Mondĉampiono el
esperantista ŝakfamilio**

Enhavo

- 61 Ameriko: De Kanado ĝis Argentino, en Kostariko (Atilio Orellana Rojas, Jorge Antonio Leoni de León)
- 62 Tri fratinoj matigis la mondan ŝakistaron (intervjuo kun László Polgár, patro de tri mondfamaj ŝakistinoj)
- 65 Afriko: Ĉu rizesperantistoj? (HOUNNAKE Raoul K.A.)
Pacifiko: Kunkongreso en Nov-Zelando (Donald Rogers)
- 66 Eŭropo: Bosnio: Bonvenas Esperantaj projektoj (Senad Čolić);
Katalunio: La bosnia defio (Hektor Alos i Font, Felip Artero i Lozano)
- 68 Instruado: Baldaŭ 500 sukcesintoj (Ivan Bekavac-Basić);
Denove internacia E-fako en Budapeŝto; La plej aktiva aĝo (Johano Rapley); 400 kursanoj el lerneja foiro (Ulrich Matthias)
- 70 Akademio de Esperanto: Dankon pro dek du jaroj (Werner Bormann)
- 71 Recenzoj: *Fraŭlino de Scuderi*, *Germanaj klasikaj noveloj* (Mauro Nervi); *Servisto de l' ideo*, *La rondo familia* (Probal Daŝgupto);
Plena poemaro de Eŭgeno Miĥalski (Michel Duc Goninaz);
Parolturnaro germana-Esperanto (Zdeněk Hršel); *Asteriks, la gladiatoro*, *Asteriks kaj Kleopatra* (Hervé Gonin)
- 74 Nefermita letero al la gazetaro
- 75 Laste aperis; Foliume
- 76 Libroservo: Samaj preferoj, eta kresko
- 77 Reagoj
- 78 Fake – Loke
- 80 Nekrologoj; Oficiala informilo

Vi trovas

en la ĉi-suba kolofono, jam de kelka tempo, la atentigon “**Redaktofino:** la 10-a de la antaŭa monato.” Bonvolu pensi pri ĝi kiam vi demandas, ekzemple, ĉu la revuo povus informi en la sekva numero pri letervespero de via klubo. Volonte! Sed memoru: kiam plejparto el vi legas ĉi tiun aprilan *Esperanto*, ni plej verŝajne jam fermis la majan.

Tamen, ni evidente klopodas aktuali. Kiam la esperantistino Zsuzsa Polgár fariĝis virina monĉampiono pri ŝako, ni tuj petis intervjuon de László Polgár pri liaj tri eksterordinaraj filinoj (p. 62-64).

Kritikado, kaj la rajto kritiki, ĉiam aktualos en Esperantujo. Kunlegu jenajn vortojn de Probal Daŝgupto (p. 72) kun tiuj de atentinda nefermita letero (p. 74): “Paco ... veras nur se en la unuopaj cerboj ĝi pensas en disaj personaj voĉoj ... homoj devas rajti kritiki ne nur la mondon sed ankaŭ unu la alian, kaj interkritiki per la komuna pacilo [Esperanto]. Tio ne tuj ĉanu la akuzon ke ili agas kontraŭ la paco aŭ la harmonio.”

La kovrilo: Zsuzsa Polgár, kun omaĝa florkrono.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anoncarifito (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuj ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario (strategia planado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282 [of/h]; ✉+1-613-565-9279 [of/h]; ☐mfettes@magi.com.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-5284-1214 [h], +31-50-613769 [of]; ✉+31-50-613763 [of]; ☐azgiow6!fred@relay.nl.net.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-208242 [of]; ✉+370-7-204970 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO): s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98 [h]; ✉+39-6-39-72-61-69 [h]; ☐mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.



De maldekstre:
Ursula Grattapaglia kaj
Atilio Orellana Rojas kun
Rodrigo Carazo, rektoro de la
Universitato de Paco de UN

De Kanado ĝis Argentino, en Kostariko

Dek ses jarojn post la antaŭa simila evento, la Tria Amerika Kongreso (12-17 feb.) okazis en la kostarika ĉefurbo San José, ĉe la Universitato de Kostariko, kun la temo "Esperanto kaj la rilatoj inter nordo kaj sudo".

Partoprenis 50 esperantistoj el 17 landoj: 11 amerikaj ŝtatoj de Kanado ĝis Argentino (kelkaj neniam antaŭe reprezentitaj en internaciaj aranĝoj, kiel Nikaragvo kaj Panamo) kaj 6 eŭropaj. Malgraŭ spertomanko pri similaj kongresoj, la LKK, gvidata de Jorge Antonio Leoni de León, organizis tre sukcesan aranĝon.

La kongreson efike apogis la amas-komunikiloj, i.a. la granda tutlanda taggazeto *La Nación*, kiuj vaste informadis antaŭ kaj dum la evento.

Ĝus antaŭkongrese, la 3-an de februaro, (re)fondiĝis Kostarika E-Asocio, kiun prezidas Hugo Mora Poltronieri (Apartado 4981, CR-1000 San José; ☐humop@sol.racsa.co.cr). Li estis gimnaziano kiam, en 1953, Tibor Sekelj instigis fondi la unuan, mallongvivan KEA.

La kongreso estis malfermita en la Teatro 1887, kies nomo (fakte, konstruaro) koincide ligiĝas al la historio de nia movado. Grandan intereson de la landaj klerigaj instancoj pri nia afero montras la fakto ke ĉestis la ministro pri edukado, d-ro Arnoldo Mora, kaj tri altranguloj de la Universitato de Kostariko. La dekano de ĉi ties beletra fakultato, Enrique Mar-

gery, dum la tuta semajno persone kontrolis la glatan iron de la aferoj.

Rilate la laboron en la kontinento, ni ĉefe diskutis la situacion de la junularo, ties organizan strukturon, kaj la staton de la instruado kaj trejnado de estontaj E-instruistoj. La plej fekundaj kunsidoj estis certe tiuj pri regiona agado kaj interlandaj rilatoj. Tiam naskiĝis aŭ firmiĝis pluraj projektoj:

- Starigo de amerika revuo en Interreto. La Universitato de Kostariko disponigis spacon por ĉi tiu amerika forumo, kiu funkcios ekde aprilo.
- Daŭrigo de kunlaboro inter Usono, Meksiko kaj Venezuelo en jama projekto pri televida kurso.
- Instigo al la landaj asocioj en la regiono de Sudmerkato (Argentino, Brazilo, Paragvajo kaj Urugvajo) por profunde esplori la eblojn eniri tiun forumon de ekonomia kunlaboro kaj informi ene de ĝi pri lingvaj problemoj.
- Ĉiu landa asocio en la kontinento nomu sine de sia estraro respondeculon pri interrilatoj amerikaj, kiu eniru la Komisionon pri Amerika Agado nome de sia lando.
- Estu pli efike diskonigata la Fondaĵo

Ameriko de UEA, pri kiu oni rekomendas la nomon Latinamerika Fondaĵo.

La cetero de la programo konsistis el brila nacia vespero kun dancoj kostarikaj, internacia vespero, kaj pianokonzerto de Teresita Alaniz (Argentino). Altnivele prelegis prof. Luis Jorge Santos Morales (Kolombio) kaj Félix García Blázquez (Venezuelo).

Kadre de la instrua parto, gvidata de Atilio Orellana Rojas, prezentiĝis la Mazi-filmo, efektiviĝis sesio de la UEA/ILEI-ekzamenoj (6 kandidatoj, 1 elementa kaj 4 mezaj sukcesintoj) kaj A-seminario pri la Cseh-metodo.

El la ekskursoj elstaris tiu al la UN-Universitato de Paco, kie ni aŭdis paroladon de la fondinto kaj rektoro Rodrigo Carazo, eksprezidento de Kostariko. La Universitato intencas enkonduki instruadon de Esperanto, kiu praktike okazu ĉe la kunaŭspicianta Universitato de Kostariko.

La serio de similaj kontinentaj aranĝoj en ĉiu tria jaro daŭros per Kvara Tutamerika Kongreso (Bogoto, Kolombio, 1999).

*Atilio Orellana Rojas (Argentino),
kun informoj de Jorge Antonio
Leoni de León (Kostariko)*

Tri fratinoj la mondan

Zsuzsa Polgár fariĝis en februaro virina mondĉampiono pri ŝako, venke defiinte la ĝisnunan ĉampioninon, la ĉinan Xie Jun. La 26-jara Zsuzsa estas la plej aĝa fratino de Zsófia (21) kaj Judit (19) Polgár, ĉiuj tri inter la plej bonaj ŝakistoj de la mondo – kaj Esperanto-parolantoj. Ni intervjuis ilian patron, László Polgár.

Via libro *Nevelj zsenit!* ("Eduku genion!", 1989) elvolvas la ideon ke el kiu ajn bebo oni povas eduki, per taŭga metodo, genion, homon kun escepta kapablo, kiun tiu kapablo – jen la ĉefa celo – igas feliĉa. Vi mem, ŝajne, brile sukcesis en tio.

La vojo al feliĉo pleje pasas tra edukigo je genio. Sed, evidente, influas aliaj faktoroj, ĉar ne ĉiuj genioj estas feliĉaj. Laŭ mia konvinko kreado estas la plej granda plezuro en onia vivo. Krome, en nia epoko kreemo estas rekompencata ankaŭ finance: neniam tiom da pentristoj vendis siajn bildojn, neniam tiom da sciencistoj povis monigi siajn praktikajn inventojn kiel nuntempe.

Laŭ viaj ideoj startis en 1989 la lernejo Talento en Budaörs, kiu iom famiĝis en Esperantujo. [Vd. apr. '94, p. 65.] *Ĉu ĝi sukcesis realigi vian edukan idealon?*

Esperanto kaj ŝako

Zamenhof jam en 1892 aperigis en *La Esperantisto* kelkajn ŝakproblemojn. En nia revuo ŝakrubriko daŭris de 1921 ĝis 1927, redaktata de František Hájek. Al la 3-a kongreso de FIDE, tutmonda organizo de ŝakistoj (Budapeŝto, 1926), Hájek kaj Paŭlo Balkányi proponis la uzon de Esperanto por organizaj aferoj, sed la federacio akceptis la lingvon nur por siaj presaĵoj.

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŝLI), kunlaboranta kun UEA ekde sia fondiĝo (1958), celas grupigi ŝakistojn inter esperantistoj kaj propagandi Esperanton inter ŝakistoj. Por siaj 170 membroj EŝLI organizas korespondajn turnirojn kaj konkursojn, kaj eldonas la kvaronjaran bultenon *Esperanta ŝako*. Ĝia redaktoro Jaromír Canibal (Okružní 867, CZ-734 01 Karviná, Ĉeĥio) disponigas malnovajn numerojn (ekde 1991/1, kontraŭ po 5 dolaroj por unu jarkolekto) kaj informas pri la venonta konkurso de EŝLI, kiu okazos venontan julion en Prago, paralele al la 81-a UK.

Sur la lasta Elo-listo de EŝLI (aprilo 1995) unuan lokon okupas prezidento Dan Maxwell (Usono, 2299); lin sekvas Rei (Estonio, 2260), G. Uŝakov (Rusio, 2245), A. Lehalle (Francio, 2234), A. Kaminskas (Litovio, 2231) ktp.

matigis ŝakistaron



Zsófia Polgár ludas blindan partion.

Laŭ mia teorio, edukante infanon oni devas frue specialiĝi pri iu tereno, kiel ŝako, matematiko, muziko, kaj surbaze de tia starto la infano poste fariĝos multflanka homo. Ĉe Talento, kiu iĝis multe pli bona ol averaĝa hungara lernejo, tiu frua specialiĝo tamen ne okazis. Oni ne respektis kelkajn el miaj bazaj principoj: ekz. intensa edukado postulas ankaŭ ke oni ne lasu la infanojn senokupaj de vendreda tagmezo ĝis lunda mateno. Estas vero ke en okjara aĝo la Talento-infanoj parolis Esperanton kaj la francan, gajnis interlernejajn konkursojn pri matematiko, kaj havis lertan teatrotrupon. Tamen, ili multe postrestis la nivelon postulatan de mia sistemo: je la aĝo de 10-12, infano devas atingi en sia fako la nivelon de universitata profesoro. Mia filino Jutka [Judit] kiel 12-jara estis jam la unua en la monda rangolisto de plenkreskuloj. Fakte, mi pruntis mian nomon al Talento pro tio ke ĝi startis el la Esperanta movado.

Kiam Esperanto aperis en la vivo de la familio Polgár? Ĉu ĝi ludis ian rolon en via eduk-metodo?

Nia kontakto kun Esperanto komenciĝis fine de la 70-aj jaroj. Tiutempe mi estis instruisto, kaj mi varbis multajn el miaj lernantoj por Esperanto: ĉ. 100-150 el ili ekzameniĝis pri ĝi. En mia libro mi dediĉis apartan ĉapitron al la individuaj kaj sociaj avantaĝoj de Esperanto, ĝia valoro pedagogia, precipe kiel lingvo enkonduka al la lernado de pluaj lingvoj.

Ĉiuj miaj filinoj parolas, krom hungare, la anglan, rusan kaj Esperanton. Jutka konas krome la hispanan; Zsófia la germanan kaj hebrean; Zsuzsa la germanan, hispanan, iomete la francan, kaj nun ŝi lernas la hebrean.



Foto: Familio Polgár

Kiam ili estis tute etaj, la Polgár-filinoj ankoraŭ partoprenis esperantistajn ŝak-aranĝojn. Ĉu ne plu?

Ne post la mezo de la 80-aj jaroj. Por diri la veron, ĉi ties nivelo ne plu konvenas por la knabinoj. Nuntempe ili ludas kun esperantistoj nur okaze, kiam tiuj renkontas nin, aŭdinte ke ni estas esperantistoj.

Ĉu ili aŭdas pri tio?

Jes, ĉar kiam nur eblas, mi ĉiam propagandas Esperanton. Inter la hungaraj ŝakistoj cetere troviĝas esperantistoj: grandmajstro László Bárczay, majstro Tibor Filep, kaj certe troviĝas multaj simpatiantoj. Se ekzistus bonaj esperantistaj ŝakturniroj, mi imagas ke pli multaj lernus Esperanton.

(Ĉi tiam aperis s-ino Klára Polgár kaj aldonis:

Mi havas superagradan instru-rajtigan diplomon pri Esperanto. Mi ofte uzis Esperanton en ĉiuj partoj de la mondo. Niaj plej agrablaj amikaj rilatoj dankeblas al Esperanto.)

Ĉu vi, kiu sukcese plenumas vian vivoplanon, havas ian "recepton" por la Esperanta movado? Ĉu vi tom sekvas ĝiajn evoluojn?

Certe, de tempo al tempo ni foliumas kelkajn revuojn, kiel la vian. Mi havas la impreson ke multon oni povus fari pli bone. Precipe necesus ligi kontaktojn kun homoj kiuj kompetentas fari decidojn en la intereso de Esperanto. Necesus ankaŭ konvinki milionulojn kaj miliardojn pretajn subteni noblan aferon.

Ĉu Zsuzsa konsideras la mondĉampionan titolon la pinto de sia kariero?

Fakte ne, ĉar ŝi jam atingis similajn rezultojn: ŝi gajnis en fortaj grandmajstraj konkursoj, atingis duan lokon en la hungara vira ĉampionado; ŝi estis la unua virino ricevinta la viran grandmajstran titolon post plenumo de la konkursoj normoj; do, la mondĉampiona titolo estis unu etapo inter la multaj. Ŝia estonteco dependas ankaŭ de kiam naskiĝos al ŝi infanoj, kiom ili forigos ŝian atenton de ŝako. Mi kredas ke ŝi ne plu progresos en sia ŝak-kariero, se temas pri konkursa ŝako. Eble ŝi progresos en arta ŝako, en komponado de problemoj; ŝi ja verkis jam du librojn kaj multegajn artikolojn.

Fakte, kion pri la privata vivo de la knabinoj?

Zsuzsa edziĝis antaŭ jaro kaj duono inĝenieron programistan-matematikistan el Tel-Avivo, kaj ili vivas feliĉe en Novjorko. Li ludas ŝakon je amatora nivelo. Zsófi restadas jam de monatoj en Israelo, ŝi vintrumas en Tel-Avivo. Jutka restas en Hungario, prepariĝas al siaj sekvaj konkursoj.

Ĉu iu el la Polgár-filinoj fariĝos "vira" mondĉampiono? Ĉu eble aliaj junaj hungaroj havas pli da ŝancoj: Zoltán Almási aŭ Péter Lékó?

Mi kredas ke neniuj havas pli da ŝancoj ol Jutka: unue, ŝi estas nun la plej bona hungara ŝakisto, ankaŭ je vira nivelo; ŝi havas 2675 resp. 2695 Elo-poentojn en la du mondaj rangolistoj kaj troviĝas inter la unuaj dek en ambaŭ, dum Almási situas inter la 15-a kaj 20-a, kaj Lékó

La Polgár-rekordoj

Zsuzsa Polgár

La unua virino en la mondo kiu iĝis vira grandmajstro plenuminte la koncernajn normojn.

La unua ŝakisto kiu samtempe mondĉampionas pri la 5-minutaj fulmpartioj, 30-minutaj rapidpartioj kaj pri la normaldaŭra ludo.

Zsófia Polgár

Atingis 8,5 poentojn el la eblaj 9 en publika ambaŭseksa konkurso (Romo, 1989).

Judit Polgár

La unua knabino gajninta knabajn mondĉampionadojn.

11-jara: virina internacia grandmajstro.

12-jara: unua sur la monda rangolisto; olimpika ĉampiono; Oscar-premiito.

12/13-jara: plenumis la normon de vira grandmajstro (por la titolo mem necesas 2-3-foja plenumo de la normoj).

La unua virino gajninta virajn super-turnirojn.

La unua virino gajninta partiojn kontraŭ mondĉampiono (ekz. Karpov, Montekarlo).

Gajnis matĉon kontraŭ estinta mondĉampiono (Spasskij).

La virino kun plej granda nombro de poentoj (2675 kaj 2694 sur la listoj de FIDE resp. PCA).

La plej ofta okupinto de la unua loko de la virina monda rangolisto (ankaŭ nun tie), kun rekorda diferenco (125 poentoj) antaŭ la dua (nun fratino Zsuzsa).

Se oni kalkulus la aĝon je kiu ŝi atingis diversajn titolojn, ŝi havus entute pli ol 50 rekordojn.

inter la 30-a kaj 35-a lokoj. Evidente, tiu el ili atingos plej alte kiu laboros plej multe, laŭ la plej bonaj metodoj. Ili ĉiuj estas en tiu aĝo kiam diversaj ĝenaj faktoroj povas interveni, ekde amo ĝis problemoj de sendependiĝo.

Ĉu ne estas kontraŭdiro inter la virina mondĉampiona titolo de Zsuzsa kaj tio ke vi, kiel konate, malaprobis la laŭseksan disigon en konkursa ŝako?

En lasta analizo ne, simple ĉar hodiaŭ ekzistas apartaj formoj organizaj por viroj kaj virinoj; aliflanke, neniu ankoraŭ senkonteste pruvis ke virinoj kapablas atingi same altajn plenumojn en intelektaj terenoj kiel viroj. Ĉi tiu estas unu el la supozoj kiujn mi ŝatus pruvi. Eĉ se mi ne povus ĝin pruvi per plenumo de mia filino, la demando restas malfermita, ĉar alies filino povus ja plenumi ĝin. Kompreneble, nia ĉefa celo estas ke unu el la knabinoj iĝu vira mondĉampiono. Judit sendube havas ŝancon por tio, se ŝi laboros multe kaj bone. Tamen, ni plukis la mondĉampionan titolon, ĉar ni vidis ke, pro diversaj kialoj, la progreso de Zsuzsa interrompiĝis. Fakte, tiu interrompo estis neevitebla, ĉar ŝi estis tiu kiu devis sperti plej multe da konfliktoj antaŭ la politika reĝim-ŝanĝo en Hungario: de ŝi oni retiris la pasporton por kvin jaroj, ŝi estis ĝenata de policanoj, de ŝi FIDE subtrahis 100 poentojn tiel ke ŝi falis de la unua al la dua loko en la rangolisto, por ne paroli pri gazetara kampanjo kontraŭ ŝi en Hungario — pro ĉio ĉi Zsuzsa ne povis atingi la rezulton iam celitan. Aldoniĝas ke Zsuzsa estis nia unua infano: ĉe ŝi ni kolektis tiujn eduk-spertojn kiujn ni poste povis uzi por la kariero de Jutka.

La dek plej bonaj ŝakistoj de la mondo, eble kun la nura escepto de Karpov, estas pli junaj ol 40 jarojn, plejparte eĉ malpli ol 30. Ĉu la altnivela sporto ĉiam pli juniĝos? Ĉu la Polgár-fratinoj estis pioniroj ĉi-terene?

Ĉiuj mondĉampionoj komencis ŝaki je aĝo tiel frua kiel 4 jaroj, ili frue specialiĝis kaj strebis kun plena forto al grandaj plenumoj. Tamen, la ĉiama plijuniĝo estas vera en la senco ke je la sama aĝo nun iuj atingas pli altan nivelon. Ekzemple, la junec-rekordon pri grandmajstriĝo tenis Bobby Fischer, sed Jutka lin superis, kaj ŝian rekordon eksigis Péter Lékó.

Ĉu vi kontentas pri la konkursa kaj poentuma sistemoj de FIDE?

Ne povas ekzisti perfekta poentuma sistemo, sed verŝajne ne eblas pli bona sistemo ol la nuntempa, kiu uzas matematikajn rimedojn por mezuri ŝakplenumojn. Laŭ mi ne necesas ĝin ŝanĝi. La konkursa sistemo de FIDE — interese — ĉiam estas subtenata de la tiutempaj mondĉampionoj, ĉar ili rajtas gardi sian titolon dum 2-3 jaroj, kaj nur poste akcepti defion al para matĉo. Por defendi la titolon, egalstato sufiĉas; la defianto devas venki

por forkonkeri la titolon. Ĝuste nun FIDE pripensas ŝanĝi la sistemon en la senco por kiu mi pledas de 20 jaroj. Estas ironio de la sorto ke tio okazas ĝuste nun, kiam mia filino estas la mondĉampiono. Ekde nun mondĉampionado devus okazi ĉiun jaron, kaj ĝi estus amaskonkurso. La mondĉampiono devus gajni la konkurson por gardi sian titolon — kaj, fakte, estas sufiĉe granda ŝanco ke iu alia gajnos el la cento da partoprenantoj, ĉar la faktoro hazardo neniam estas ekskludebla el sporto. Laŭ mi, ĉiujara mondĉampionado utilis, ĉar la pli ofta eblo mondĉampioniĝi malfermus perspektivon al junaj ludantoj. Finfine, ne estas normale ke en sporto tiel praa kiel ŝako, Zsuzsa estas nur la oka mondĉampiono! Dum, ekzemple, en naĝado oni jam medalis eble mil mondĉampionojn.

Ekde la lasta fojo en Linares (1994) ne okazis konkurso en kiu la vira mondĉampiono Kasparov kaj Judit Polgár ambaŭ aperus. Oni klaĉas pri bojkoto de Kasparov al Judit.

Ne estas klaĉo, sed fakto ke Kasparov ne akceptas partopreni tie kie Judit ludas. Laŭ klaĉoj, li plurfoje diris publike ke, dum li estos mondĉampiono, li ne ludos




Foto: Familio Polgár

Judit Polgár dum gajnata matĉo kontraŭ eks-mondĉampiono Boris Spasskij.

samturnire aŭ en matĉo kun Judit. Iuj manaĝeroj tamen klopodas organizi la “matĉon de la jarcento”, inter la plej bonaj vira kaj virina ludantoj, do, inter Jutka kaj Kasparov aŭ Karpov. Oni planas premian fonduson de kvin milionoj da dolaroj, eventuale eĉ ties duoblon. Ni vidos ĉu tio tuŝos Kasparovon. Li vivas ne nur per ŝako, li estas ankaŭ tre sukcesa negocisto, do, povus okazi ke eĉ por tiu sumo li ne volus riski malvenkon kontraŭ Jutka. Kasparov estas tre forta ludanto, sed ankaŭ Jutka — kaj ŝi ankoraŭ evoluas, ŝia ludoforto povas plu kreski. ★

Kelkaj klarigoj

FIDE (Fédération Internationale des Échecs, Internacia Ŝakfederacio), tutmonda organizo de ŝakludantoj, estis fondita en 1924. Membras en ĝi pli ol 120 ŝtatoj. Ĝin prezidas, ekde la fino de 1995, Kirsan Iljumĝinov (cetere, prezidento de Kalmukio).

Same FIDE kiel la konkurenca organizo PCA (Professional Chess Associ-

ation, Ŝak-asocio de Profesiuloj) regule pretigas rangoliston de la plej bonaj ludantoj. Ambaŭ listoj baziĝas sur la sistemo de t.n. Elo-poentoj, aljuĝataj laŭ la rezultoj akiritaj en iuj difinitaj konkursoj. Mondĉampionoj havas ĉ. 2800 Elo-poentojn; grandmajstroj inter 2500 kaj 2700; internaciaj grandmajstroj “valoras” de 2300 ĝis 2500 poentojn. Por ĉi tiuj titoloj necesas plenumi la kondiĉojn difinitajn de FIDE.

Matĉo oni nomas aron da partioj inter du ludantoj; en turniro partoprenas pli ol du personoj.

La Oscar-premion donas AIPE (Asocio de Ŝak-ĵurnalistoj) al la plej bonaj vira kaj virina ludantoj de la jaro.

La konkursa kaj poentuma sistemo estas apartaj por virinoj kaj viroj. La vira mondĉampiono estas ekde 1989 Gari Kasparov (Rusio); la virina — ekde 1996 — Zsuzsa Polgár (Hungario).

Ĉu rizesperantistoj?

Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE) estas, ekde 1995, la kvara aliĝinta landa asocio de UEA en Afriko. La sekretario de UTE nun informas pri tre viglaj agado kaj kongreso pasintjare.

La fundamenta ideo de la nova UTE-statuto adoptita dum la 2-a Togolanda E-Kongreso en 1994 (vd. nov. '94, p. 183) estis ke la estraro laboru sub la kontrolo de la komitato. Dum la unua agad-jaro, la celita sistemo iel funkciis. La estraro kun-sidis 14 fojojn en 1995, la komitato 4 fojojn. En la kampo de *informado*, UTE celis realigi televid-elsendon pri Esperanto. La kontaktoj ekis, kaj la estraro re-renkontos la ĵurnaliston kiu ĝin prizorgos. Rilate *instruadon*: 38 komencantoj partoprenis kurson en Lomé kaj Aného de la 7-a ĝis la 18-a de aŭgusto. Por perfektiga kurso man-kis intereso. Rimarkinde, la kurson en Lomé gvidis personoj partoprenintaj staĝon por kursgvidantoj samloke inter la 24-a kaj 29-a de julio. Krome, UTE sendadas korespondan kurson al kelkaj komencantoj. La *internaciaj kontaktoj* de la UTE-membroj estas multnombraj, i.a. dank' al tio ke la estraro repagas afrankojn al membroj kiuj sendas liston de sia korespondo. La asocio sukcesis aperigi sian nacian periodaĵon *Alvoko*. UTE subvencias

klubojn, sed ne ĉiam ricevas raporton pri la uzo de la mono.

La 3-a Togolanda E-Kongreso (28-31 decembro, Kpélé-Govié ĉe Kpalimé) kunigis 137 gesamideanojn el ĉiuj sekcioj de UTE kaj el kunlaborantaj organizoj kiel Tietti-Instituto de Esperanto en Togolando. Gastoj alvenis el Benino, Niĝerio kaj Italio. Kongresa rezolucio atentigis i.a. pri "troa juneco de afrikaj esperantistoj" kaj pri tio ke nun en Afriko "ekzistas esperantistoj

rimarkinde pli bonnivelaj ol multaj esperantistoj eksterafrikaj". La rezoluciantoj "firme kondamnas ... ke esperantistoj insultas afrikajn esperantistojn [kiel] 'rizesperantistojn', 'almozulojn', kio ... montras ke eĉ en nia movado esperantistoj elmontras sian rasismon kontraŭ nigruloj; tiaj tendencoj hontigas kaj ridindigas nian Esperanto-movadon". La rezolucio fine rekomendas i.a. ke "UEA kaj aliaj E-organizaĵoj zorgeme subtenu, gvidu, protektu kaj eduku la afrikajn esperantistojn nun junajn, [por] ke en sia ne-juneco ili kapablu prizorgi la movadon".

HOUNNAKE Raoul K.A.
Sekretario de UTE



PACIFIKO

Kunkongreso en Nov-Zelando

Ankaŭ pri la 82-a UK en Adelajdo (1997) diskutis en la dua kunkongreso de la Aŭstralia kaj Novzelanda E-Asocioj (AEA kaj NZEA, 3-10 jan., Aŭklando) la ĉ. 45 partoprenantoj, inter ili 11 aŭstralianoj, 9 japanoj, norvego, meksikano kaj dano.

Kelkaj el la plej bonaj aŭstraliaj E-instruistoj ĉeestis: akademiano Donald Broadribb helpis progresintojn, Vera Payne kaj Jenny Bishop instruis la komencantojn resp. du geinfanojn.

De Alan Bishop, profesoro pri matematiko ĉe Universitato Monash en Melburno, ni aŭdis pri la esplorprojekto EKPAROLI, kiun li entreprenis kun sia edzino Jenny. En ĝia kadro ok pedagogoj instruas Esperanton al 240 infanoj en tri elementaj lernejoj. Oni intencas post unu plia jaro taksii

la efikecon de Esperanto kiel antaŭ-helpilo por la lernado de aziaj lingvoj. [Red.: En venonta numero ni raportos pli detale pri la projekto.]

En nacia radioprogramo dum 20 minutoj simpatia intervjuisto parolis kun la prezidanto de AEA, juĝisto Kep Enderby, prokuroro en antaŭa aŭstralia registaro, kiu en 1975 respondicis pri la kontraŭdiskriminacia leĝo, la unua el kelkaj paŝoj por plibonigi la leĝan statuson de la aborigenoj.

Dum unu el la ekskursoj ni vizitis

maorian kunvenejon (*marae*). Al la bonvenigaj paroladoj de la lokanoj (plejparte en la maoria lingvo) respondis Brian Fox, Kep Enderby kaj Fred Adams (Fox kaj Adams maorie). Gastiganto montris al ni i.a. totem-foston, kiun donacis kanadaj indiĝenoj al la urbo Aŭklando dum la tieaj ludoj de la Brita Konfederacio en 1990.

Dum la tre ĝuinda kaj sukcesa kongreso ni diskutis ankaŭ pri la Adelajda UK. NZEA konsideras aranĝi postkongresan ekskurson en Nov-Zelando.

En la 12-a Aŭstralia E-Somerlernejo (15-27 jan., Adelajdo) 59 lernantoj partoprenis kursojn de Katalin Smidéliusz, Jenny Bishop kaj Marcel Leereveld.

Donald Rogers (Nov-Zelando),
kun informoj el
Esperanto sub la Suda Kruco

Bosnio: Bonvenas Esperantaj projektoj

Bosnio kaj Sarajevo estas sendube du loknomoj kiuj dum la lastaj kvar jaroj skuis kaj korpremis la tutmondan publikan opinion.

En ilia tragedio multaj rekonis propran tragedion, en ilia batalo pluraj travivadis propran batalon. “Eŭropo vivos aŭ mortos en Bosnio”, emfazis la ĉefo de la vatikana diplomatio. La ĉefurbestro de Barcelono, prezidanto de Asocio de Eŭropaj Metropoloj, deklaris: “ni faris ion por Sarajevo, sed Sarajevo faris multe pli por ni, ĉar la civita spirito plej forte konfirmiĝis ĝuste en Sarajevo”.

La militaj jaroj ŝajne pasis. Bosnio sukcesis defendi sin de la brutalega agreso, Sarajevo sin savi de la senkompata sieĝo. Nun ili fariĝos grandaj konstruejoj. En la rekonstruado partoprenos gvidaj financaj institucioj de la mondo, ĉefaj ekonomiaj potencoj, iuj nur pro ekonomiaj interesoj, kelkaj pro moralaj kialoj — purigo de la propra konscienco. Preskaŭ ne ekzistas evoluanta lando kiu ne preparas propran partoprenon en la rekonstruado de Bosnio, precipe de Sarajevo. Miliardoj da dolaroj estos tie investitaj dum la sekvaj jaroj. Sed ĉu la alfluonta mono almenaŭ akcesore tuŝos la Esperantan aferon?

Partnero transvivis

Por ĉiu serioza entrepreno plej gravas havi fidindan partneron, kiu povas kompetente kunlabori en ĝiaj planoj. Bonŝance en Bosnio tia ekzistas. Ĝi transvivis la militan inferon, eĉ dum la tuta milita tempo ne ĉesis aktivaj. Temas pri Esperanto-Ligo de Bosnio

kaj Hercegovino (ELBiH), kaj ĝia eta profesia firmao “esperint”.

Sarajevon nun vizitas diplomataj kaj ekonomiaj delegacioj el la tuta mondo kun siaj ofertoj. Multaj rekte partoprenos en almenaŭ simbola helpo. Tamen la urbon kaj la landon ĝis nun ne vizitis iu ajn oficialulo de la E-movado. Dum la milito eble estis tro danĝere — kvankam facile eblis fari tion tra la sistemo de humanitaraj organizoj aŭ la ĵurnalisma reto, kaj pro tiu neglekto oni maltrafis grandegajn (profitodonajn) eblojn en humanitara kaj amas-komunika sencoj —, sed nun persona sekureco ne plu estas preteksto. Ĉu diversaj E-institucioj ne povus sin trovi en ies investaj/donacaj sumoj per kelkaj promiloj?

Se eŭropaj metropoloj planas subteni la socian kaj kulturen vivon de Sarajevo per milionoj da dolaroj, oni sentu tie ankaŭ sian ŝancon, kaj partoprenu per propraj realigeblaj projektoj en la aktuala tendenco.

Kion faru esperantistoj?

Ideojn por ellabori propran projekton povas doni la planoj starigitaj komune kun Kataluna E-Asocio (vd. p. 67). Se kelkaj projekteroj koincidos, tio ne ĝenu vin. Inĝenierado, do projektado kaj (re)konstruado de publikaj kaj industria objektoj (inkluzive ĉiujn metiajn laborojn), estas interesa ekonomia sfero. Disvendado de adekvata ekipaĵo aŭ komercado per diversaj

varoj proponas novan eblon. Alia agadsfero estas peri loĝigon en Sarajevo, kie la hoteloj estas detruitaj. Povus allogi la ideo kunfandi etan entreprenon aŭ kooperativon, ekz. por kokid-bredado aŭ fungokultivado. Pri ĉio ĉi kompetente pretas kunlabori “esperint” (fakso +387/71/441-843).

Kelkajn netipajn E-aktivaĵojn oni jam faris, novajn oni planas: En la Universitato de Torino okazis scienca kunveno pri Bosnio, organizita pere de ELBiH, en la finna ĵurnalo *Kansan Uutiset* aperas longa felietono pri vivo en la sieĝata Sarajevo. Al Sabadell (Katalunio) veturos grupo de Sarajevaj esperantistaj infanoj por dusemajna ripozo. Bonvenas pliaj similaj iniciatoj.

Inter multaj bibliotekoj, ankaŭ la Esperanta estas detruita. Ĉu via klubo ne povus sin turni al oficiala instanco aŭ ekonomia subjekto por peti modestan subvencion cele al aĉeto de kelkaj E-libroj? (La librojn tamen ankoraŭ ne sendu, ĉar ni ne scias kie loki ilin!)

Fine, se vi ne povas helpi al ni, eble ni povas helpi al vi! Ĉu serĉante monon por Sarajeva biblioteko oni ne povus riĉigi la propran bibliotekon kaj tiamaniere kuraĝigi la E-eldonejojn? Ĉu petinte subvencion por viziti nin en Sarajevo vi ne povus sperti interesan, rakontindan vojaĝon? Ĉu ne eblus inviti al via tradicia aranĝo gaston el Bosnio? Kun viaj ideoj turnu vin al: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (Senad Ĉolić), M. Preloga 2-B/III, BA-71000 Sarajevo, Bosnio. Ni invitas vin al kunlaboro pro ambaŭflanka intereso. Iniciatemo estas bonvena al la rekonstruata Bosnio!

Senad Ĉolić

Prezidanto de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino

Vizitu vian propran domon ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo dum

MALFERMA TAGO

sabaton la 27-an de aprilo 1996 (10h00 — 17h00)

- ★ Konatiĝu kun la domo kaj ĝiaj laborantoj
- ★ Senhala prezentado de Esperanto-filmoj
- ★ Aĉetante en la libroservo, vi ĝuos rabaton de 10% (kaj ŝparos la sendokoston)
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj



Katalunio: La bosnia defio

La katalunaj esperantistoj de pluraj jaroj ŝajnas pli interesiĝi pri agado peresperanta ol pri agado por la lingvo mem. Lastatempe tia intereso inspiris al ili kunlaboron kun la revivanta bosnia E-movado.

La turnpunkto direkte al peresperanta agado estis eble la lanĉo de la nacilingva revuo *Frequencies*, kiu prezentis artikolojn tradukitajn el Esperanto. Samtempe la aranĝoj de Kataluna E-Junularo fariĝis diskutejoj pri neesperantaj temoj. Kataluna E-Asocio (KEA) ekkontaktis kaj kunlaboris kun i.a. SOS Rasismo, Amnestio Internacia, Internacia Lesba kaj Geja Asocio, Cigana Unio, Eŭropo por Bosnio kaj la kataluna Unesko-Centro.

majnoj komisiono difinis projekton, kiun pliriĉigis respondo de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBiH) pri siaj efektivaj bezonoj.

Tiel, fine, ni kune sukcesis difini "Projekton de kunlaboro por la rekonstruo de la asocia reto de Bosnio kaj Hercegovino". Ĝi ne celas varti la tro oftan (kaj konatan) memcentremon de la esperantistoj, sed sin prezenti kiel avangardan ekzemplon sekvindan de aliaj neregistaraj organizoj.



La kataluna socio ĉiam estis bona bedo por la Esperanta planto. Jen librejo Esperanto en Barcelono, kiu festis sian 17-an datrevenon prezentante la libron *Survoje al universala civilizo* de Giordano Moya (tria de dekstre).

Rezulte, KEA konsideriĝas preskaŭ kiel kunfondinto de la potenciĝanta Federacio de Katalunaj Organizoj Internacie Agnoskitaj (FKOIA), dank' al kio ni antaŭvidas baldaŭ atingi konsultajn rilatojn kun la kataluna registaro. Partopreno en tiu medio ebligis al ni strebi al pli larĝaskalaj projektoj, kiel nia nacia kongreso (jan., p. 14).

En tiu aranĝo estiĝis propono kunlabori kun la bosniaj esperantistoj por restarigi ilian asocion. Surbaze de la kondiĉoj en Bosnio kaj de la realaj ebloj de la E-movado, en kelkaj se-

La projekto dividiĝas jene:

- Eldono de *Spite al ĉio, Bosnio*, elekto el la E-lingvaj elsendoj de Radio Sarajevo (ĉ. 120p).
- Eldonado de la trimonata revuo *Bosnia lilio* (24p). Ambaŭ redaktotaj de ELBiH, dum KEA okupiĝos pri la komposto, eldono kaj distribuo.
- KEA klopodos havigi por la estonta oficejo de ELBiH modernan ilaron: komputilon, faksilon, aŭtomatan respondilon, eĉ bazan oficejan materialon. (Kontribuoj bonvenas ĉe la UEA-kontoj "kaea-b" kaj "elbh-j".)

KEA rajtas uzi la kanalojn de la kataluna Unesko-Centro por sendi ĉiajn pakaĵojn al Bosnio, ankaŭ tiujn de aliuloj.

- ELBiH kaj KEA kunordigas viziton de grupo de bosniaj infanoj al Katalunio, organizatan de la magistrato de la urbo Sabadell kaj de la civitana komisiono Solidara Sabadell.

La projekto ekis per labora kaj prelega vizito de Senad Ĉolić, prezidanto de ELBiH (marto, p. 58). La perspektivoj aspektas esperigaj. La projekton oni taksas simpatia kaj realigebla. Laŭ propono de ELBiH kaj KEA, FKOIA decidis organizi kolektivan vojaĝon al Bosnio, por ke ĝiaj diversaj membroj-organizoj kontaktu siajn paralelajn asociojn kaj ekkunlaboru; peros la kontaktojn ELBiH kaj KEA. Ni esperas ke la vizitoj al gravuloj, iliaj skribaj subtenoj, la eĥoj en la gazetaro kaj la lobiado pere de amikaj organizoj potencaj helpas nin akiri monon por realigi plimulton de la projekto.

Flanke de Kataluna E-Asocio, ekstaras du defioj: unuavice, kontentigi la esperojn kiujn ni vekis ĉe bosniaj esperantistoj; kaj, en pli larĝa perspektivo, plu ŝanĝi la societecan agadon de nia asocio, kiu iele trapele (kaj tre dankinde) limakas jam 90 jarojn, por funkciigi ĝin kiel nuntempan neregistaran organizon, kiu, per aktiva kunlaboro kun aliaj NRO-j, plej atente kaj diligente lernante el ilia spertego kaj profitante el la delongaj ligoj transnaciaj de la esperantista komunumo, sukcesos prezentigi kiel organizo aktiva kaj estiminda.

Hektor Alos i Font kaj

Felip Artero i Lozano (Katalunio)

Legi, aŭdi Bosnion

La derviŝo kaj la morto. Meša Selimović. Trad. Roger Imbert. Sarajevo: ELBiH, 1990. 310p. Romano "pri temo tuthomare gravega: la konflikto inter la atendoj de la socio kaj la propra konscienco" (Gerrit Berveling). 66,00 gld.

Esperanto el Sarajevo. Vol. 1 kaj 2. Dek ses elsendoj de Radio Sarajevo en Esperanto inter aŭgusto 1994 kaj januaro 1995. 2x60min. 30,00 gld.

Baldaŭ 500 sukcesintoj

La sepa jaro de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI portis la suman nombron de trapasintoj al 488.

En 1995 okazis 11 sesioj en 6 landoj de 3 kontinentoj. Kandidatiĝis 108, sukcesis 79 homoj, el 22 landoj. Ĉinio sola liveris 41 sukcesintojn (vd. tabelon). Ĉi-jare multaj kandidatoj petis de la sekretario informojn kaj malnovajn testojn, kio sendube plibonigis iliajn rezultojn — kvankam multaj daŭre donas malpli da atento al movadaj kaj literaturaj scioj ol al gramatiko.

Realigis la plurjara deziro aranĝi apartan sesion dum kongreso de Ligo Internacia de Blindaj E-istoj. Malgraŭ neantaŭvideblaj problemoj, tre brile organizis ĝin entuziasma teamo gvidata de Nora Moerbeek. Interesiĝo de pluaj kongresanoj certigas ripeton de la sesio dum la venonta LIBE-kongreso.

Ĝenerale oni sentas mankon de gvidlibro por la ekzamenoj. Blinduloj des malpli povas trovi taŭgan prepar-

materialon. Kvankam en 1995 novaj testoj estis uzataj, alvoko al testverkemuloj daŭre validas. Eseoj verkitaj dum ekzamen-sesioj publikiĝis en *Kontakto*. Ni esperas ke oni daŭre presos valorajn eseojn.

Kelkaj el la sesioj planataj por 1996: 4-8 apr., Kordovo, Argentino; 11-12 majo, Zagrebo; 20-26 jul., LIBE-kongreso, Prago; 27 jul.-2 aŭg., ILEI-kongreso, Tábor, Ĉeĥio; 6-11 aŭg., Kultura E-Festivalo, Kopenhago. Ĉiuj informoj ĉe la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono:

Prof. Ivan Bekavac-Basić

Kušlanova 59

HR-10000 Zagreb, Kroatio

Urbo, lando, monato	kandidatoj		landoj	sukcesis	
	elementa	meza		elementa	meza
Massa, Italio, apr.	1	—	1	1	—
Zagrebo, Kroatio, majo	2	—	1	1	—
Tuusula, Finnlando, jul.	2	5	5	2	4
Tampere, Finnlando, jul.	8	10	9	6	8
Övik, Finnlando, jul.-aŭg	1	3	3	1	3
Barlaston, Britio, aŭg.	2	6	1	2	—
Lomé, Togolando, aŭg.	6	—	1	4	—
Sète, Francio, sept.	1	3	2	1	3
Chengde, Ĉinio, nov.	45	7	1	34	7
Zagrebo, Kroatio, dec.	3	—	2	2	—
Kpélé-Govié, Togolando, dec.	—	3	2	—	—
Sumo	71	37		54	25

NOVA tejo-VARBILO!



tejo ĵus eldonis 8-paĝan faldfolion tre allogan, kiu informas pri la avantaĝoj membri en **tejo** kaj pri la manieroj kontribui al ĝi.

Enhave redaktita de

Thomas Pusch,

ĝi venas kun

fotoj kaj grafiko

de Franĉjo

Veuthey, por kiu

pozis brazila

esperantisto.

Clay Magalhães.

Dukolore presita

en A6-formato

(10cm. x 15cm.),

grandaj literoj


kaj dinamika

teksto-sinsekvo.

Se vi deziras

ricevi ekzemplerojn por

distribuo, turnu vin al **tejo**.



Nieuwe Binnenweg 176,

NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Denove internacia E-fako en Budapeŝto

La Esperanto-fako de Universitato ELTE en Budapeŝto planas startigi ekde septembro 1996, la trian fojon, sian ses-semestran internacian kursaron korespondan.

La 3-jara kursaro celas doni lingvistikan bazon por la studado de la internacia lingva komunikado kaj okupiĝas pri diversaj terenoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Post du jaroj da bazaj studoj, la tria jaro ebligas profundigi en elektitan fakon (E-gramatiko kaj -literaturo, interlingvistiko, lingvopedagogio, ĵurnalistiko kaj redaktado, komputila lingvistiko) kaj preparas por doktoriĝo. La kandidatoj devos prezenti sian disertaĵon ene de tri jaroj kaj ekzameniĝi antaŭ doktoriga komisiono.

Postuloj: superagrada diplomo (min. bakalaŭreco aŭ grado "MA"), bona lingvoscio.

Formo: Po du unusemajnaj restadoj en septembro kaj januaro-februaro por prelegoj, konsultiĝo kaj ekzamenoj. Dumsemestre: memstara laboro.

Kotizo: po 1000 usonaj dolaroj por semestro.

Informoj: Esperanto-fako, ELTE BTK, Pf. 107, HU-1364 Budapest, Hungario. Tel. (d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits): +36/1/166-55-95.

Aliĝo ĝis la 15-a de aprilo (!): ELTE Rektori Hivatal, Oktatási Osztály, Nemzetközi Interlingvisztikai Szak, Szerb u. 21-23, HU-1056 Budapest. Sendu biografieton kun foto, legitimitan kopion de via diplomo kaj, eventuale, ateston pri via Esperanta lingvoscio.

La plej aktiva aĝo

Oni kutimas nomi "tria aĝo" la periodon de la vivo kiam oni ne plu aktivas en sia profesio. Kial ne aktivigi tiam pri Esperanto, profitante la ekziston de tutmonda, nemovada strukturo?

Antaŭ 22 jaroj Pierre Vellas, profesoro en Tuluzo, rimarkis ke la konstruaĵoj kaj ekipaĵoj de lia universitato restas neeksploatataj dum granda parto de la jaro. Li do iniciatis por nestudentoj serion da prelegoj kaj aliaj eventoj por plenigi la vakajn salonojn. La ideo ricevis la nomon "Universitato de la Tria Aĝo" (U3A), kaj estis tiel sukcesa ke ĝi baldaŭ disvastiĝis tra la tuta mondo, sub malsamaj nomoj kaj en iom diversaj formoj.

U3A ne estas universitato laŭ la kutima signifo; ekz. ĝi dividiĝas ne en fakultatojn sed en naciajn kaj lokajn grupojn, kiuj nek gvidas ekzamenojn nek aljuĝas diplomojn. La intereso pri U3A kreskas, ĉar hodiaŭ mezjunaj kaj maljunaj personoj kutime disponas iom da libera tempo, kaj multaj el ili povas antaŭvidi plurnajn jardekojn da aktiva ekspluatado kaj ĝuado de akiritaj scioj.

En Britio funkcias 306 aŭtonomaj grupoj de U3A kun ĉ. 50 000 membroj. En septembro 1995 okazis nacia U3A-konferenco en Swansea (Kimrio), kie Hilary Chapman, la brita ĉefdelegito de UEA, havis okazon prelegi pri Esperanto, kaj Beatrice Clarke prezentis mallongan provlecionon.



Johano Rapley klopodas impresi U3A-anojn per UEA-Jarlibro en Deal (apud Dovro).

Mi mem preparis enkondukan programon ĉe nia loka grupo — kvazaŭ ŝtelire. Kiel? Nu, muzikoprogramo estas tre populara, kaj mi prezentis ilustritan prelegon pri la muziko de

esperantisto Frank Merrick (vd. marto '93, p. 53), i.a. pri liaj Esperanto-kantoj (poemoj de Kalocsay ktp.). Ĉar mi klarigis la poemojn kaj eĉ deklamis unu el ili antaŭ ol aŭdigi la muzikon, oni poste esprimis al mi miron pri la poezieco de Esperanto, kaj jam demandis: Kial ni ne havu E-kurson? Mi reagis instinkte: bone, sed prefere post enkonduka prelego pri la temo.

Dirite, farite: en januaro mi parolis pri "Esperanto: la fantazio kaj la faktoj". Rezulte, baldaŭ komenciĝis kurso kaj starigis nova E-grupo, kiu intenscas sisteme spektadi la videokursojn *Mazi*. Ni listigis ĝis nun 14 personojn. Tio neniel kontentigas nin, sed ni esperas grade kreskigi la nombron per logaĵoj kiel ekskurso al Grésillon. Krom tio, ni akiris multajn simpatiantojn, kiuj povus peri pluajn prelegojn pri Esperanto al organizoj diversspecaj.

Esperanto estas instru-objekto en almenaŭ dek kvin U3A-grupoj (Britio 8, Aŭstralio 3, Francio 2, Italio 2). Por kontaktigi tiujn kiuj jam instruas aŭ lernas Esperanton sub la egido de U3A, ni eldonas la bultenon *Ligilo*, kaj ni jam havas kontakton kun 78 samideanoj en 23 landoj (sed kun U3A-grupoj nur en la supraj 4 landoj). Mi varme bonvenigas ĉiujn informojn por ke nia internacia Esperanto-reto povu plej bone funkcii.

Johano Rapley
17 The Grange, Shepherdswell
Dover, Kent CT15 7QB, Britio

400 kursanoj el lerneja foiro

Unuafoje Germana E-Asocio havis standon en la granda lerneja foiro Interschul (12-16 feb., Stutgarto, pli ol 60 000 vizitantoj). La interesiĝo superis ĉies atendojn. Oni allogis per lotumado, en kiu pli-malpli ĉiu serioza interesato povis gajni senpagan partoprenon en kelkhoraj Esperanto-kursoj en diversaj urboj. Fine entute pli ol 400 homoj enskribis sin por la kursoj. Cento da instruistoj serioze interesiĝis pri la eblo mem instrui Esperanton, ekzemple kadre de t.n. "projektsemaĵo", kaj ne malmultaj tuj aĉetis lernolibron aŭ vortaron.

Ulrich Matthias (Germanio)

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu internacian respondkuponon, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio



Dankon pro dek du jaroj

En sia demisia artikolo en la libro *Aktoj de la Akademio III* Prof. Gaston Waringhien, prezidanto de la Akademio de Esperanto, dankis en 1979 al d-ro André Albault, kiu "montris senlacen aktivecon kaj esceptan laborforton, kunigitajn al apartaj klarvideco kaj ekzakteco".

Mi tiam konis d-ro Albault kiel prezidanton de la landa asocio en Francio, kun kiu ni, la landa asocio en Germanio, aranĝis komunan kongreson en Strasburgo 1969. Ankaŭ tiun movadan funkcion do d-ro Albault plenumis.

En la jaro 1983 d-ro Albault estis elektita prezidanto de la Akademio. Li estis tri fojojn reelektita kaj nun forlasis la postenon post dek du jaroj kun intensa klopodado. Li tenis la Akademion laboranta per siaj *Cirkuleroj*, en kiuj li amplekse traktis la aktualajn problemojn de la lingvo kaj de la institucio.

Gvidis lin la alta sento pri la valoro de la internacia lingvo. Tial li sentis doloron kiam li trovis en ĝi punkton ŝajne malpli bonan. Do li eklaboris pri tiaj aferoj.

Unu tia demando estas la land-nomoj. Jam en la 8-a Oficiala Aldono al la Universala Vortaro li traktis tion, sisteme kiel direktoro de la Sekcio



D-ro André Albault

pri Ĝenerala Vortaro de la Akademio (publikigita en la libro *Aktoj de la Akademio II*, 1968-1974).

Tiu problemo estis la ĉefa esploraĵo de lia prezidanteco, al kiu li dediĉis tre fortan atenton. La membroj de la Akademio prilaboris la temon kun li, voĉdonis plurfoje pri liaj proponoj, oni atingis la opinion de la plimulto, ĉio ĉi daŭris jarojn ĝis fina listo establiĝis.

Apud tiu laboro en la Akademio d-ro Albault publikigis du librojn pri landnomoj, *Vojaĝo tra la landoj kaj Multlingva glosaro pri land-nomoj* (ambaŭ 1991). Malgraŭ tiu multa prilaborado de ĝuste tiu temo restis malfermaj punktoj, nur kelkaj, sed tiuj des pli premaj. D-ro Albault havis zorgojn pro tio, kaj kelkaj atakoj kontraŭ li estis vunde sentataj.

Grava helpanto de li kiel prezidanto estis Jean Thierry, la sekretario/kasisto de la Akademio. Tiuj du estraranoj en Francio fondis asocion por certigi la finan bazon de la Akademio: La Amikoj de l' Akademio.

Tiu asocio eldonis revueton: *La Letero de l' Akademio de Esperanto*; meritplena entrepreno, ĉar tiel la Akademio povis montri siajn laborojn al la esperantista publiko. Tion ĝi faris ankaŭ dum la Universalaj Kongresoj en bone vizitataj publikaj kunvenoj. D-ro Albault tre bedaŭris ke lia sanstato apenaŭ iam permesis al li vojaĝi al kongresoj kaj mem gvidi la Akademian kunvenojn.

Elstara evento dum la prezidanteco de d-ro Albault estis la kolokvo de la Akademio "Pri la stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto" en Prago, 1994 (kies prelegoj estis publikigitaj en samtitola libro de la ĉefa eldonejo KAVA-PECH). Li preparis ĝin, verkis sian kontribuon, sed evidentiĝis ke li malgraŭ ĉiu volo ne kapablas partopreni.

Nun d-ro Albault post dekduo da jaroj en la pinto de la Akademio retiriĝis el la prezidanta ofico sed kompreneble restas membro de la Akademio. Li multe kontribuis al la bonfarto de la internacia lingvo.

La Akademio dankas al li pro lia multa laboro por la lingva institucio, kaj mi kiel lia posteulo ligas kun mia danko la esperon ke d-ro Albault ankoraŭ longe daŭrigos sian fruktdonan laboron por nia afero.

D-ro Werner Bormann
Prezidanto de la Akademio de Esperanto

Aperis...

scienca revuo

n-ro 2 (165) - vol. 45 (1994)

ENHAVO


Influo de dopamino, de haloperidolo kaj de kelkaj adrenergaj rimedoj al eksperimenta sepso	Nikolaj I. Ŝigajev (GUS-RU)	3
La formado de frupolitikaj rilatoj en la protobaktria civilizacio de la bronza epoko	Vladimir I. Ionesov (GUS-UZ)	9
Refuto de kombinatorika konjekto de P. Turán	Ulrich Matthias (DE)	26
Esprimo de la malproksima parencaro per la prefiksoj <i>pra-</i> kaj <i>bo-</i>	Balázs Szemők (HU)	31
"Lexicon silvestre, prima pars" – kun novaj vortradikoj	K.-H. Simon, I. Ullrich, H. Weckwerth (DE)	35
Recenzo (sn): Premioj en 1994 por ĝustaj vivrimedoj	Right Livelihood Award Foundation (SE)	41
Recenzo (sn): <i>Science and Democracy</i> de W. Verloren van Themaat (NL)		44
Recenzo (rh): Serĉado pri la perfekta lingvo (<i>Die Suche nach der vollkommenen Sprache</i>) de Umberto Eco (IT)		46
Recenzo (rh): Transe de la tempo (<i>Jenseits der Zeit</i>) de John Gribbin (GB)		52
Recenzo (rh): George Grosz: Berlin-New York, Neue Nationalgalerie, Berlin (DE)		55
Pri ISAE kaj <i>Internacia Scienca Revuo</i>	Kopioj	57

Internacia Scienca Asocio Esperantista

ISAE-Sekretario R. Hauger, Ringstr. 13, CH-8172 Niederglatt, Svisio

Jarkotizo 1994 resp. 1995: 25,- CHF. UEA-konto "isae-z"

aŭ poŝtkonto Zürich 80-5909-0 "ISAE".



Saĝas ĉiu laŭ sia maniero

Fraŭlino de Scuderi (1820). E. T. A. Hoffmann (1776-1822). 76p. 21cm. 20,70 gld. **Germanaj klasikaj noveloj**. 116p. 21cm. 36,90 gld. Ambaŭ: El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Iltis, 1992.

Veneno, ponardoj, sango, suspektoj: certe la aventura intrigo en la novelo de Hoffmann pravigas la kovrilan aserton ke per ĝi la aŭtoro “enkondukis la detektivan ĝenron en la germanan literaturon”. Esperantistoj, kiuj laŭ eldonejaj klasifikoj aparte ŝatas krimromanojn, certe aĉetos ĉi tiun tradukon jam pro ĝia enhavo. Sed amuzo kaj streĉiteco ne estas la solaj karakterizoj de ĉi tiu verko: vi trovos en ĝi la grandajn problemojn de romantismo pri la individuo, kaj la dubojn de Hoffmann pri ties efektiva konsisto. Protagonistas ne certeco, sed trompiĝo: la plej honestan aspekton oni juĝas suspektinda, kaj atenta leganto trovos kialojn por pridubi tion kio ŝajne aperas plej pura kaj senkulpa, eĉ en la fino de la novelo. Kiel ĉe lia samtempulo Kleist, ĉi tiu teksto estas legebla multnivele: kiel krimromano, ja, sed ankaŭ — malpli supraĵe — kiel plej moderna esploro pri la homa psiko, kaj kiel malespera dubo pri ties unueco. Nia volo kaj nia faro tiom distancas ke nur skizofrenia disiĝo povas klarigi ilian kuneston en ununura homo.

En la antaŭparolo, la tradukinto informas la legantojn pri la cirkonstancoj en kiuj la novelo naskiĝis, kaj pri ties akcepto en la eŭropa kulturo; tiaj informoj estas aparte gravaj kaj dezirindaj por krei *kuntekston* al la legado, kio plej favoras inteligentan ĝuon de literaturo.

Almenaŭ du el la tri noveloj kolektitaj en komuna volumo apartenas al la ĝenro krima, kiu ŝajne furoras en la Esperanta medio: *La krimulo pro honoro perdita* de Schiller kaj *La fago de la judoj* de la poetino Annette von Droste-Hülshoff estas majstroverkoj de la germana literaturo. Per realisma priskribo de la vilaĝa vivo en la germana kamparo dum la pasintaj jar-

centoj, ĉi tiuj rakontoj elvokas la sentojn, la moralon kaj la ĉiutagan konduton de impetaj popoloj, kiujn primitiva vivoforto kondukas al krimo kaj al ekzilo. La du novelojn inteligente kontraŭpezas *Novelo* de Goethe, kiu male pledas por evoluo de la primitivaj, naturaj fortoj direkte al civilizo kaj humanismo. Goethe aparte malamis la romantisman plezuron je sovaĝaj sentoj, kaj la princo en la novelo fakte tiel meditas: “Kurioze . . . ke la homo ĉiam deziras ekscitiĝi per teruraĵoj . . . La bonaj homoj volas terurigi por senti poste pli intense, kiel belas kaj agrablaj spiri libere” (p. 43). Kaj la moralaĵon de ĉi tiu mirinda Goeta teksto vi trovos sur paĝo 51: “Dio donis saĝon al la princo kaj igis lin ekkoni, ke saĝas ĉiuj verkoj diaj, ĉiu laŭ sia maniero.”



Goethe (maldekstre) kaj Schiller — iliajn kaj alies germanajn majstroverkojn peris Esperanten Reinhard Haupenthal.

Oni devas danki kaj gratuli Reinhard Haupenthal pro ĉi tiu grava riĉigo de nia tradukprovizo. Honesta recenzanto tamen devas ankaŭ dediĉi kelkajn vortojn al la lingva aparteco de liaj tradukoj. Mi legis kun speciala atento ĉi tiun volumon, kaj konvinkiĝis ke la ofteco de neologismoj — nome de *literaturaj* vortoj, kiujn tre

malmultaj utiligus en la ĉiutaga konversacio — estas ĉi tie okulfrapa kaj povus ĝeni multajn legantojn, eble eĉ la plejparton; kaj mi kredas ke neniu nacia literatura lingvo akceptus tian densecon de surprizaj vortoj, se oni esceptas — eble — la futurismajn avangardojn. *Men* anstataŭ *malpli*, *enemiko* anstataŭ *malamiko*, *hike* anstataŭ *ĉi tie* ktp: mi respektas tiajn lingvajn decidojn, sed legonto sciuj ke tra la tuta teksto svarmas tiaj glosindaĵoj. Histerie ataki la emon al neologismoj ŝajnas al mi stulte: lingvo ne bezonas defendantojn, ĉar ĝia natura evoluo spontane selektos tiujn vortojn kiujn la uzantoj perceptas kiel plej konformajn al la lingvo mem, kaj se iu uzis amason da vortoj kiujn la lingvo ne akceptos, tiam la posteuloj retrospektive juĝos tiun aŭtoron lingve malaltvalora. Do, floru ĉiuj floroj. Nur *unu* neologismon, surbaze de tiaj konsideroj, mi tamen opinias erara, nome *lo* en frazoj kiaj: “Revulo ŝatas *lo* mirindan” (p. 15). En la fina glosaro, oni legas ĉe “lo”: “la -o; l’o; tio, kio estas -a; lo stranga = la strang(a)ŝo. *Uzita jam de Grabowski*” (kursivo mia). Ĝuste la kursiva pravigo estas — paradokse — la pruvo ke la vorto ne uzindas. Se, post tiom da jaroj, vortouzo ne enradikiĝis, oni prefere forgesu ĝin. Elterigoj tre malofte povas redoni bonfarton al kadavroj.

Enestas, fine, diversaj prezeraroj, kaj bedaŭrinde ankaŭ misoj pri kiuj oni neniel povas kulpigi la presiston: ekzemple, la metafore tro peza *revolucioj* por traduki *Wechsel* (p. 44), aŭ eĉ — pli simple — la manko de subjekto en la frazo “Tute vane tiom suferis!” sur paĝo 100.

Mauro Nervi (Italio)

Konturoj de siaspeca socio

Servisto de l' ideo. 50 jaroj ĉe UEA 1908-1958. Hans Jakob (1891-1967). Editoris Mark Fettes. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1995. 120p. 21cm. 33,00 gld. **La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio.** Nikola Rašić (1957). Pisa: Edistudio, 1994. 192p. 22cm. Bind. 27,00 gld.

Oni tiras nian atenton, dumaniere, al la interna ideo kaj la movado kiun ĝi movas jam de cent jaroj. La altirantoj deĵoris/-as en UEA-oficejo.

La memoraĵoj de Jakob rakontas pri la organizita efektivigado de la Ideo; subjektive li skribas, elinterne. Elpaŝante el tiu interno, la memuaro de Rašić proponas relegi la sociologiajn studojn pri la uzantaro de Esperanto kun li, kiu ilin konvene aranĝas tiucele. Sub lia profesia gvidado, ni lernas la Internajn Ideanojn rerigardi de la senmajuskliga ekstero. Tiel komencas videbli frapa kaj ankoraŭ de neniŭ palpe konstatita konturo de siaspeca socio.

Post tiu vojaĝo de la Jakoba interno al la Raŝiĉa ekstero de la Ideo, ni konstatas ke ĉi tiu nia unika mikrosocio ankoraŭ ne scias taksi siajn povojn, koni siajn verajn voloĵojn, kaj el tio kuiri povo-volo-kongruajn konscion kaj farendaron.

Restas eble ke ni omaĝu al la cifera bazo de du objektivemaj aŭtoroj kaj provu legi ilin unuece kaj kontinue. Laŭ tia lego, la movado konsekvence emfazadis la praktikan flankon de la lingvo, kaj tiu flanko konstante restis la interna ideo mem de translimaj, nekutimaj amikaroj. Tia unueciga lego de la tekstoj donacos al la kongresoj kaj la superaj kursoj plaĉan serion da "objektivaj" rezolucioj kaj komunaj akceptebloj. Tiel la vervaj ŝatantoj kiel ankaŭ la nuraj praktikantoj de tiaj pritraktoj de nia tagordo devus do akiri ĉi tiujn gravajn librojn. Studo de ili donos al la Samideoj seriozan bazon. La rezultonta trankvilo faciligos la pluajn varbadon kaj kursadon.

La necesa solidaro-konstrua pieco apoganta tiujn nemalhaveblajn kolektivajn aranĝojn povas ja kunvivi kun la rigora pripensado. Sed, por ke tia kunvivo ne oftege paneu, ni devas konsenti ke oni kune kaj dise pensos en kongresoj, kursoj, seminarioj. Ni ne insistu ke *el* ĉiu kunestado tuju efektivaj sanktaj harmonioj en rezolucia, amaskomunikinda formato.

Tia neinsisto eble fariĝos daŭripova vivaranĝo inter la formaj asocioj, kiuj

devas *kunteni* la Pacajn batalantojn, kaj la substanca Paco, kiu veras nur se en la unuopaj cerboj ĝi pensas en disaj personaj voĉoj, do *distene*. Alidire, eble tiel aperos solvo pri la eterna streĉiĝo inter la *movada* jeso de la amasaj tujoj kaj la *kultura* ĉuo de la personaj malrapidoj. Por ke homoj skeptikaj kaj kritikaj lernu kunlabori en alternativa "kultura movado", ili devas rajti kritiki ne nur la mondon sed ankaŭ unu la alian, kaj interkritiki per la komuna pacilo.

Tamen ekzistas aliaj legoj. Homoj malpli inklinaĵoj senĉese fortiĝi la solidarojn eble vidos inter niaj du libroj transiron de la *instruema* Movado de la Jakoba tempo al pli *lernema* komunumo en la Raŝiĉa; transiron de la entrepreno konstrui por aliaj maksimume *vastan parolilon* al ne malpli

“

*La lingvo kiel vivejo
daŭre donas al siaj anoj
malfacile forlaseblan
kunloĝilon.*

”

verva klopodo konstrui por si optimume *efikan aŭskultilon*.

Rašić sin demandas ĉu la komunumo turnas sin internen (en, ekzemple, la raŭma tendenco kaj ĝia objektiva bazo) reage al la ĝenerale akceptita fina malvenko. Post lia ekstera rigardo, en kies kadro ni legas la elinternan rakonton de Jakob, iuj el ni pretigos sin por propraj elinternaj deklaroj, formuloj, klariĝoj kongrue kun la tiel precizigita aktualo. Ĉu la nuna Esperantio akceptas kaj eĉ deziras taktikajn malvenkojn? Ĉu ĉi tiuj estu aŭskultoj kaj do pluralaj, male al la iam dezirita unika venko por establi neŭtralan parolilon? Tia interpreto similigas nian movadon kontraŭ la lingva hegemonio al tiuj malpor la ŝovinismoj vira, blankula, malaborigena k.s. Ĉiuj tiuj movadoj — nomu ilin "postŝtataj" — celas ne konkeri al si ŝtaton sed draste modifi la konscion de la hegemonianoj, sen

kies konsento la maljusta ordo ne falos. Volante ne milite strategi sed repensige taktiki, ili devas konsekvence enfokusigi ne la naciojn kaj la grandajn praktikojn de la scienc-teknika mondo, sed la nociojn kaj la perceptan remapadon de la tero, lige al la lokaj perceptoj kaj do realoj.

Kio estas la perceptaj sukcesoj dank' al kiuj Esperanto estas loko? La determina sukceso de la nuna lingvo estas ke ĝiaj trafikaj aŭtoroj trafis revidi kaj revidigi la teron kiel ejon por naturana-homarana kunvivo kaj ne kiel mapon da posedeme intermordaj bienoj. La krona sukceso de ĝia movado, malgraŭ katastrofaj militoj eksteraj kaj detrua kverelado interna, estas "elteni", se ne ĉiam "pacience", tamen renovige, kio indikas ke la lingvo kiel vivejo daŭre donas al siaj anoj malfacile forlaseblan kunloĝilon, tamen ne devigante eternan (kaj sufokan) brakumadon.

Sukcesoj tiaj bezonas legon — kaj postlaboron — ekologian, suplemente al la cifera kaj kaŭzologiaj. Sekvante niajn avangardajn (ĉar instinkte ĝustent kurajn) praktikojn, eble ankaŭ niaj ideoj nun konsentos malpli laŭti ekstere pri la tuja oficialigo en lernejoj. Eble ni preferos atenti nian internan taskon plivastigi kaj mem ekposedi la malŝovinismajn revidojn de la tero kaj teranoj. Tiujn revidojn heredigas al ni la Esperanta praktika tradicio, kies stilojn plej lerneble kaj reliefe gvidas la literaturaj praktikintoj de la arto fidele vidi la teron kiel homejon kaj ne naciejon.

Ho, se nur la arkanaj teorioj, kies nevolaj (kaj diversaj) ĉhoj densigas la foje malbonvenajn tekstojn de konceptemuloj, povigus nin tuj, efike, koncepti nian heredindan tradicion kaj laŭtparolile heredigi ĝin, unue al ni mem, kaj due ekster la komunuman getton! Kiel riĉe kaj suke, sen malpacienco kaj sen la klaĉista rondfermemo, Jakob rakontas pri la movado kiu dum la unua mondmilito pionire peris mesaĝojn kaj amikaĵojn, sed kiu neniam lernis peri inter la propraj disputantoj! El la suka ironio de tiel senpovaj herooj, kiaj studiloj? Kiu studos la emon de la altgustaj gejunaj kongresanoj, kiuj kredas la kongresojn siaj, recenzi niajn aranĝojn rilate la "etoson" de kongres' post kongreso? Kaj tiros konkludojn reire al la skribtabuloj, sur kiuj konstruiĝas organizaj nestoj por la verdaj birdoj?

Probal Daŝgupto (Bharato)

Ne papilio sed torento

Plena poemaro 1917-1937. Eŭgeno Miĥalski (1897-1937). Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1994. 176p. 21cm. 31,80 gld.

Jen ni fine disponas, sub la redakto de William Auld kaj kun informo-riĉa enkonduko de Krys Ungar, la plenan poemaron de unu el niaj plej gravaj poetoj, kiun la literaturhistoriistoj iom supraĵe klasifikas en la skolo "soveta" aŭ "proleta" kaj kiu "plu staras iom aparta de la ĉeĥfluo de nia poezio" (W. Auld). *La unua ondo* (1918) antaŭas la famigintan poemaron de Kalocsay *Mondo kaj koro*, kaj *Prologo* (1929) atingas poezian nivelon kiun povis konkurenci nur *Streĉita kordo* du jarojn poste, eĉ se intertempe aperis Hohlov kaj Baghy.

La relegado — kaj la unuafoja lego por iuj ĝis nun nepublikigitaj pecoj — konfirmos la severajn juĝojn de iuj kritikantoj pro la mallertaĵoj kaj naivaj (pli ol "perfortaj", laŭ la takso de Kalocsay) "lingvoeksperimentoj" de Miĥalski. Ĝi malkonfirmos la negativan juĝon de Kalocsay pri *Prologo*. La ciklo "Ajno", "Danco de skeletoj", "Neĝa rondo" apartenas al la poezia trezoro de nia lingvo.

Kalocsay lasis al ni pri Miĥalski la formulon "flirta papilio", kiu certe maltaŭgas por tiu poezia torento ("De monto alta, en fal' senhalta, / torento kuras..."). "Violonĉelo kaj tamburo" — tiel Auld simbolis la temojn erotikajn kaj revoluciajn en la verkaro

de Miĥalski — estas etiketoj kiuj montriĝas neadekvataj por karakterizi la poezian vojon de Miĥalski. Ne eblas dekreti nun: la lirikaj versaĵoj de Miĥalski estas atentindaj, sed liaj politikaj elpaŝoj estas nur "kruda skemismo" (laŭ la juĝo de Kalocsay, kiu tiam ankoraŭ ne estis verkinta versaĵojn laŭde al Lenin' kaj Stalin!). La tuta verkaro de Miĥalski evidencigas al ni la kutiman dramon: baraktante en kontraŭdiro de la vivo, li verkis valorajojn; volante senbalastiĝi de la kontraŭdiroj kaj ripozigi siajn mensojn kaj animon en "idealo", li verkis banalaĵojn ("Antaŭen... Al nova viv-konstruo! Al nova viv-rimed'!"). Kiam li sentimentale romantikumas kaj kiam li



Eŭgeno Miĥalski

prilaŭdas la sovetian reĝimon, lia muzo feblas: la "bardo de l' batalo" ne valoras pli ol la "amokavalir". Sed kiam li baraktas en la konfliktoj de amo kaj amoro ("Golgotas la vivo...") kaj kiam li indignas kaj satiras kontraŭ kapitalismo kaj faŝismo, li atingas altajn ŝtupojn de sia arto. Demonŝtritis ke lia solidareco kun la kontraŭfaŝistaj hispaniaj batalantoj estis pli inspiriĉa por li ol la "konstruo de socialismo" kaj la enkonduko de traktoroj en kolĥozojn.

Multo restas direnda pri la vers-tekniko de Miĥalski, kio ne eblas en la kadro de la nuna recenzo. Oni ofte parolis pri "liberaj" versoj, kiam temas fakte pri varieto de la versoskemoj interne de la sama poemo aŭ pri versoj bazitaj ne sur la silabonombro, sed sur la akcento-distribuo. La abortaj rimoj, kiujn oni riproĉis al li, integriĝas en tiun versteknikon. Nenio klarigeblas sen aludo al Majakovskij, al kiu cetere estas dediĉita la lasta poemo. Miĥalski kvazaŭ respondas al la *Plendo* de lia samlandano Hohlov, riproĉinta al Zamenhof pri la "monotona tajdo, en samakcenta rond'". Mi atentigu ĉi-koncerne al la studo de Verloren van Themaat, aperinta en *Fonto* (marto).

La verkoj estas prezentitaj laŭ ordo de apero, de *La unua ondo* ĝis *Kantoj de l' amo kaj sopiro*. Sed evidente oni trovos poemojn de la diversaj epokoj en ĉiu aparta poemaro, kaj la leganto povas kun profito konstrui por si kronologian sinsekvon de la poemoj.

Michel Duc Goninaz (Francio)

Unua paŝo utila kaj laŭdinda

Parolturnaro germana-Esperanto. Hans kaj Kerstin Wiersch. Leuven: Esperanto 2000/Flandra E-Ligo, 1995. 414p. 21cm. 42,00 gld.

Unuavide la frukto de dekjara laboro — sendube formika — estas admirinda. Aperis plia vortara verko nacilingva-Esperanta, "briketo" (Wiersch) por vortarego germana-Esperanta. Sed por finfari la brikon, necesos faka kunlaboro de vasta aro da uzantoj kaj kunlaborantoj. Oni povas nome jam post kelktaga uzado de la verko trovi mankojn plurspecajn: redaktajn, lingvajn, teknikajn k.s.

La strukturo de la artikoloj ne estas sisteme ordigita, kio faras precipe la pli ampleksajn netraverseblaj. La deziro esprimi la germanan infinitivon per ekvivalento infinitiva kondukas al

formoj kiel "ekzisti kelka simileco" kaj "farigi iun dieton". La mallongigoj aludantaj al verkoj konsultitaj estas senbezonaĵoj (escepte de Z — Zamenhof), ĉar kelkaj ne respondas al la faktoj. Plurfoje, ne ĉiuj (ŝlosil)vortoj de la parolturno aperas sub la koncernaj artikoloj, aŭ se jes, ne ĉiam ili ricevas la saman ekvivalenton Esperantan, ekz. *den Anker werfen* = "jeti la ankron" kaj *Anker werfen* = "ankriĝi"; *er hat/trägt das Herz auf der Zunge* estas nur sub la artikolo *Herz*, la diraĵo *sein Herz auf der Zunge haben* estas nur sub *Zunge* kun tute malsamaj ekvivalentoj.

Troviĝas ankaŭ eraroj: "kurateco" anstataŭ "kuratoreco", "tenti" anstataŭ "provi (mortigi sin mem)". *Wenn ich so sagen darf* havas la ekvivalenton "se estas malpermesate al mi diri" — kial ne simple "se mi rajtas diri"? Ankaŭ stile la Esperanta ekvivalento devas esprimi la germanan originalon. Tiusence *unter dem Herzen tragen* ne egalas al "esti graveda". Evitinda estas germanisma vortordo kiel "nur agi nepre sekure" aŭ "nur agi laŭ sia obstina kapo". El pluraj prezeraroj elstaras *Hasenpapier* anstataŭ *Hasenpanier*. Kaj fine iom da humuro: jen neologismo "kako" (kontraŭaviadila kanono) por la germana *Flak*.

Sed la verko ja estas utila por ĉiu germanlingvano volanta perfektigi. Laŭdinda estas la unua paŝo farita de la geaŭtoroj.

Zdeněk Hršel (Ĉeĥio)

Krak, pif, pof, poc, clap, bouhouhou

Asteriks, la gladiatoro (1964) kaj **Asteriks kaj Kleopatra** (1965). Goscinny. Desegnis Uderzo. Trad. Nedeljko Korasić. Zagreb: Izvori, 1994 resp. 1995. Po 48p. 29 cm. Po 16,80 gld.

Tuj kiam mi eksciis ke novaj aventuroj de Asteriks aperis en Esperanto, longe post *Asteriks la Gaŭlo* (1977), scivolo ekkaptis min. Ĉu same lertaj, spritaj kiel la unua traduko, farita de internacia rondo?

Nu, ĉe la legado mi ne trovis la atenditajn sukcon kaj viklecon. Io evidente mankis kompare kun la franca originalo. La nomoj de la roluloj (Asteriks, Obeliks, Malmuziks, Moŝtiks, Miraklomiks) ja perfekte taŭgas, cetere ili estas tiuj de *La Gaŭlo*. Unuavide la enbildaj interjekcioj taŭge esperantis en *Gladiatoro* (*kraaaak, pif, paf, pof, frap, plong*...) sed jam ne same bone en *Kleopatra* (*poc, clap, bouhouhou, scotch*,...).

El la granda kvanto da vortludoj kaj aludoj de la franca teksto nur malmultaj reaperas en Esperanto. Apud kelkaj lertaj traduk-eroj, abundas plataĵoj. Ofte, ĉefe en popolaj esprimoj, oni havas la impreson ke la tradukisto ne komprenis la tekston, aŭ ne kaptis iun spritaĵon, tiel ke li laŭvorte tra-

dukis: “Asteriks ĉiam devas komandi, pri tio ne ŝercu” (*Kleopatra*, p. 21) anstataŭ “Asteriks ĉiam ordonemas, sensencaĵo!” Plurloke la frazoj ŝajnas malelegantaj kaj pezaj kompare kun la ekkrioj, rapidaj interjekcioj de la originalo: “la sola kio nin povus timigi”, “ripeti la veton kian ni havis pri la legianoj”, “kiom min rilatas, tre volonte” (*Gladiatoro*, resp. p. 9,



Kelkloke la novaj Asteriks-albumoj Esperante spritas.

14, 15); “ĉi tio estas la sola kion li povis alporti” (nur tion li povis alporti), “ni ekiru vidi la ŝninkson” (ni vizitu...), “la kuko havas nenion kun la malsano” (neniel rilatas...), “kaj ĉio nur pro tio ĉar...” (*Kleopatra*, resp. p. 19, 21, 32, 35).

Por la fino mi lasis frazojn eĉ tute forĵetendajn gramatike, feliĉe ne tro abundajn: “Mi neniam disiĝas min de mia saketo”, “Vi bedaŭros pri tion” — se ne paroli pri kopieraroj kiel ekz. “ni revenis” anstataŭ “vi revenis” (*Kleopatra*, resp. p. 30, 38, 27).

Certe traduko de Asteriks ne estas literatura gravaĵo, epokfara klasikaĵo; tamen, ni ne rajtas prezenti Esperantan version pli malbonkvalitan ol la alilingvaj tradukoj ekzistantaj. Multaj personoj komparos la tradukojn — komencantoj, lingvistoj dezirantaj testi Esperanton. Kia seniluziigo kaj malbona propagando, se Esperanto ne samniveblas!

La lingvouzado de la Asteriksa rakonto estas tiel sprita, aluda, ke tuta teamo internacia sed nepre entenanta kelkajn francojn — pro la originala lingvo de la serio — ne superfluus. Mi insistas, des pli ke la kroata eldonejo anoncis pliajn Asteriks-tradukojn!

Hervé Gonin (Francio)

Nefermita letero al la gazetaro

Jam de kelkaj jaroj, la legantoj de la Esperanto-gazetaro estas atestantoj de akra polemiko inter Giorgio Silfer, prezidanto de LF-koop, kaj Georgo Kamaĉo, akademiano.

Ni, la subskribintoj de ĉi tiu letero, opinias tiun disputon malutila por la tuta esperantista komunumo. Aparte nin konsternas la enhavo de la “Komentario al la letero de adv. Favre”, legebla en la n-ro 156 de *Literatura Foiro*, aŭgusto 1995.

Ni tial,

1. alvokas la redakcion de LF agnoski ke, se oni levas akuzon al jura rango, nur ĝisfina(j) proceso(j) de jura(j) koncerna(j) instanco(j) povus determini la kulpecon de Georgo Kamaĉo aŭ/kaj de Giorgio Silfer aŭ/kaj de aliaj;

2. asertas ke ĉiu akuzo al Georgo Kamaĉo, unuavice pri “antisemitismo”, duavice pri diversaj “deliktoj”, estas sen jura aŭ fakta pruviteco, kaj ke tio same validas por ĉiu akuzo al

Giorgio Silfer pri “fiecio” kaj por aliaj akuzoj, pli literaturecaj ol formalaj, kiel montras la ĝenro de la publikigaĵoj en kiuj ili aperis;

3. petas ke ĉiuj redakcioj respektu la principojn de ĵurnalisma etiko, enlasante la esprimon de alpartiaj argumentoj kaj replikoj;

4. opinias ke ĉi tiu kverelo ne devintus eliri ekster la kadron de satira-literatura sfero, kia normalas en la plimulto de etnolingvaj literaturoj;

5. konsideras utila la eblon ke estonte kreiĝu, interne de Esperantujo, profesia rekomenda juĝ-instanco (en konekso kun Esperanta Jura Asocio), al kiu oni povus sin turni okaze de tiaj konfliktoj, se oni deziras levi al strikte jura nivelo plendon aŭ akuzon pri aferoj okazintaj en nia kultur-medio kaj en la internacia lingvo;


6. petas s-rojn Giorgio Silfer kaj Georgo Kamaĉo meti la finan punkton al sia jam tre daŭra kaj sterila plumbatalado kaj apliki sian ener-

gion al progresigo de Esperanto sur terenoj kie ilia talento montriĝis kaj certe plu montriĝos brile frukto-dona.

Subskribintoj:

Hèctor Alòs, William Auld, Gerrit Berveling, Osmo Buller, Jordi Carbonell, Timothy B. Carr, Manuel Casanoves, Duncan Charters, Probal Daşgupto, Christian Declerck, Liven Dek, István Ertl, Ricardo F.A.R., Miguel Fernández, Mark Fettes, Ada Fighiera Sikorska, Higinio García, Joan R. Guinón, Salvador Gumà, Helmuth Huppertz, Tatuo Huzimoto, Rejna de Jong, Armela Le Puil, Ĵak Le Puil, Antonio Marco Botella, Abel Montagut, Gabriel Mora i Arana, Gonçalo Neves, Paul Peeraerts, Wouter Pilger, Baldur Ragnarsson, Nikola Rašić, Trevor Steele, Syôzi Keiko, Zlatko Tišljär, Humphrey Tonkin, Krys Ungar, Eli Urbanová, Antonio Valén, Francisco Veuthey, Amri Wandel, Bertilo Wennergren.

Laste aperis



Esperantistoj kaj normo. Sociolingvistika enketo pri parola Esperanto-normo 1992-1995. Marie-Thérèse Lloancy. Lons (Pau): la aŭtoro, 1995. 171+13p. 30cm. Ringe bind. Enketo kun 16 vizitantoj de Kastelo Grésillon en 1992. 39,00 gld.

Esperanto en praktiko. Petko Arnaudov (1931). Pazarĝik: E-Societo "Radio", 1995. 32p. 20cm. Vojaĝimpresoj el Koreio kaj Japanio. 7,50 gld.

Esperanto Studies: An Overview. Humphrey Tonkin (1939), Mark Fettes (1961). Rotterdam/El Cerrito: UEA, 1996. 16p. ISSN 0165-2575. 22cm. Esperanto Documents 43A. Kun bibliografio. 4,80 gld.

Historio de Japanio kaj Koreio: Enkonduko. Kuboi Norio. El la japana trad. kaj eld. Esperanto-grupo por komuna lernolibro pri historio. Oosaka, 1995. 12+124+44p. 26cm. Abunde ilustrita rilato-historio de la du landoj, verkita de japano kun sendiskrimnaciiga sinteno. 30,00 gld.

Hungara-Esperanta meza vortaro.

Magyar-Eszperantó kézikönyv. István Szerdahelyi (1924-1987) kaj Ilona Koutny (1953). Kunredaktantoj: Ottó Haszpra, Balázs Wacha. Budapest: Hungaria Esperanto-Asocio, 1996. 12+835p. ISBN 963-571-459-9. 21cm. Bind. Granda vortaro kun 65 000 leksikaj unuoj. Multaj proverboj, esprimoj kaj sintagmoj; sciencaj kaj teknikaj vortoj. 75,00 gld.

Jarkolekto Esperanto 1995. Rotterdam: UEA, 1996. 220p. 27cm. Bind. 51,00 gld.

Konspiro de Katilino, La. Kajo Salustio Krispo (86-35 a.K.). El la latina trad. Gerrit Berveling. Chapecó: Fonto, 1995. 71p. 21cm. Fonto-Kajeroj 13. Klasika historia verko pri okazaĵo en Romo en 63 a.K. 12,60 gld.

Neniu povas ŝanĝi hieraŭon. Aira Kankunen (1928). Göteborg: la aŭtoro, 1996. 63p. ISBN 91-972463-4-4. 21cm. Poemaro kun etoso kiu "odoras je severa norda naturo kaj susurantaj suojaj someroj" (Bertil Nilsson). 7,50 gld.

Preĝado, La (1944). Alexis Carrel (1873-1944). El la franca trad. d-ro André Albault. Chapecó: Fonto, 1995. 34p. 21cm. Fonto-Kajeroj 15. Eseo de Nobel-premiita kuracisto-fiziologo pri la tekniko, efikoj kaj signifo de preĝado. 9,00 gld.

Sordine. Mila Ramos. El la portugala trad. Leopoldo H. Knoedt. Chapecó: Fonto, 1995. 63p. 21cm. Ilustris Álvaro Borges. Fonto-Kajeroj 17. Brazilia poetino proponas "Sokratajn amojn, plenajn de aludoj subtilaj" (D. da Silva). 16,80 gld.

Sub la signo de la Kolombo: paco regu.

Omraam Mikhaël Aïvanhov (1900-1986). El la franca. Fréjus: Prosveta, 1995. 140+16p. ISBN 2-85566-612-0. 18cm. Majstro de Universala Blanka Frataro parolas pri "la esenco de vera paco kaj la kondiĉoj de ĝia efektiviĝo". 17,40 gld.

Teri-strato. Douglas Dunn (1942). El la angla trad. William Auld. Chapecó: Fonto, 1995. 62p. 21cm. Fonto-Kajeroj 14. Poemaro de nuntempa skota poeto pri la ĉiutago de grandurba strato. 10,80 gld.

Vino, viroj kaj kanto. Eli Urbanová (1922). Chapecó: Fonto, 1995. 60p. 21cm. Ilustris Richard Fremund. Fonto-Kajeroj 16. Kvazaŭ suplemento poezia al la furora romano *Hetajro dancas*. 10,80 gld.

Vortoj de Valo. Kun studoj kaj artikoloj. Rajmundo Laval (ps. Valo, 1900). Beauville: Broŝurservo de SAT, 1995. 155p. 21cm. Elektro el kulturaj, movadaj, politikaj tekstoj aperintaj en *Sennacieca Revuo*, *Sennaciulo* kaj *Laŭte!* inter 1950 kaj 1992. 15,90 gld.



Strata sceno de L.S. Lowry ilustras la skotan poemaron Teri-strato, unu el la kvar freŝaj Fonto-Kajeroj.

Yon zikan de oboeru tikiyūgo esuperanto. Tsukasa Kobayashi (1929) kaj Yoko Hagiwara (1947). Tokio: Hakusuisha, 1995. 212p. ISBN 4-560-00524-9. 19cm. Ilustris la tri filinoj de la verkintoj. "La globolingvo Esperanto lernebla en 4 horoj"; enkonduka lernilo por "inteligentuloj kiuj jam scias la anglan lingvon". 49,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Foli- ume



• **Alternativa kunlaboro kataluna**

De kvin jaroj Kataluna E-Asocio kunagas kun Enllaç ("Ligo"), kultura asocio pri alternativaj sociaj problemoj, kaj provizas ties kvaronjaran revuon, *Via fora!* (800 ekz-oj), per resumoj kaj enhavtabelo en Esperanto.

• **Abono Perla ebla**

La Esperanto-Redakcio de Radio Aŭstria Internacia (AT-1136 Wien) varbas abonantojn por sia eldonota duonjara broŝuro, *Perloj*, kiu enhavos la plej interesajn materialojn disaŭdiĝitajn.

• **La faraono voĉas Pettyn-e**

Andrzej Pettyn laŭtleĝis sur 38 unu-horaj kasedoj la romanegon *La faraono* de Bolesław Prus, en la fama traduko de Kabe. Ĉiu aŭskultanto de Pola Radio (Skrytka 46, PL-00-977 Warszawa) kiu almenaŭ unufoje skribis al ĝi kaj sekve troviĝas en ties adresaro, rajtas mendi la registraĵon de la eldoninto, Pola Asocio de Nevidantoj (Polski Związek Niewidomych, dir. Jan Rodański, Zakład Produkcji Nagrań, ul. Konwiktorska 7, PL-00-216 Warszawa), je la rabata prezo de 50 usonaj dolaroj (egala al la prezo de malplenaj kasedoj) aŭ egalvaloro. (*Leterkesto* de Pola Radio)

• **Kelklinie pri ...**

La junularaj revuoj de Aŭstrio kaj Svislando, *Voko el Stirio* resp. *La kanguruo* kunfandiĝas en *L'alpa kanguruo*. Plu redaktas Michael Martin kaj Rolf Ernst. (*Eventoj*). ... Por la ĵus debutinta bulgarlingva revuo *Espero* Bojdar Leonov (p.k. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario) atendas esperantlingvajn kontribuaĵojn. ... Kiel suplemento de *Medicina Internacia Revuo*, aperis "Angla-Esperanta medicina terminaro" de Saburō Yamazoe. ... "Neregula bulteno eldonata de rumanaj esperantistoj", *Bukureŝta Informilo* estas redaktata de Ionel Oneț en Kalifornio, kaj kunordigata de Marian Vochin en Rumanio.

Samaj preferoj, eta kresko

Malgranda sed signifa estis la kresko de la Libroservo de UEA en 1995.

La vendoj jarfine sumiĝis malnete je 255 475 gld., 2,8% pli ol en la antaŭa jaro. Tamen la neta gajno, entute 102 064 gld., superis je 5% la rezulton de 1994, kio signifas ke pasintjare kreskis la proporcio de senrabataj vendoj, ĉefe al individuoj. Manko de signifaj novaj UEA-eldonaĵoj iom ŝrumpigis la pograndaĵojn al libroservoj kaj kluboj, kvankam la subaj statistikoj montras daŭran debiton por kelkaj eroj de la UEA-eldonejo. Konsiderinde influis la suprajn ciferojn la vendoj dum la Tamperea UK, preskaŭ duoblaj kompare kun tiuj de la Seula. Tiun "finnan influon" oni vidas ankaŭ en la furorlisto de la entutaj vendoj (*Kalevala* kaj *Muminvalo*, venditaj rabate).

Kiel kutime, aperas du tabeloj. La maldekstra montras la librojn venditajn unuope, plej ofte rekte al klientoj. En ĝin tamen ne eniras la dumkongresaj vendoj, kvankam ili grandparte koncernas unuopulojn. La dekstran liston influas, krom la UK, ĉefe la mendodecidoj de libroservoj.

Pro egalstato je la lasta loko, la listo enhavas po 21 titolojn. Ĉi tie ni tamen menciuj krome la atingintojn de la sekvaj tri lokoj (22-24), kiuj apenaŭ postrestis la enlistajn pintulojn. Temas pri la "entutaj" *Lasu min paroli plu!* (Piron, 75), *Vivi estas dange* (Nemere, 73), kaj la poŝvortaro finna-Esperanto-finna (Vilkki/Favén, 61); kaj la "unuopaj" *Sen titolo*, romano de Ŝirjaev el la pioniraj tempoj de Esperanto, *Hetajro*

dancas, aŭtobiografia romano de Eli Urbanová, kaj *Ne nur soldato Ŝvejk* de Jaroslav Hašek, ĉi-jarcenta klasikaĵo de la ĉeĥa literaturo (po 19 vendoj).

Ŝajnas neŝanĝita — kaj komprenebla — la prefero de la verda publiko pri vortaroj, gramatikoj, lerniloj, lingvaj konsultlibroj unuflanke (10 el la 30 titoloj aperantaj en la du listoj), al facilaj legaĵoj, bildrakontoj, krimromanoj kaj infana literaturo aliflanke (9).

Aparte prifalĉis la merkaton la ĝisnunaj du Asteriks-albumoj, kies sendubaj sekvantoj celos la pintojn de la furorlisto pri 1996. Tamen, laŭinde pintas la enorma debito de la peza poezia klasikaĵo *Kalevala*. Ĝia loko estas sufiĉe escepta en ĉi tiu sukceslisto, kiun karakterize plenigas parte novaj furoraĵoj (10 el la titoloj aperis en 1995), aliparte daŭraj revenantoj — kiel *Gerda malaperis!*, *Faktoj kaj fantazioj*, *La Sankta Biblio* kaj aliaj.

pz-ie

UNUOPAJ VENDOJ

73 Asteriks kaj Kleopatra, Gosciny/Uderzo	16,80 gld.
60 Esperantaj sinonimoj, J. Ojalo	15,00 gld. (1)
49 Pasporta Servo	24,00 gld. (16)
48 Asteriks, la gladiatoro, Gosciny/Uderzo ..	16,80 gld.
41 La kunularo de l' Ringo, J.R.R. Tolkien ...	48,00 gld.
39 Etimologia vortaro de Esperanto N-R, E. Vilborg	33,00 gld.
35 Tohuvabohuo (KD/kasedo), Kajto	25,80/19,50 gld. (2)
35 Comprehensive English-Esperanto Dictionary, P. Benson	48,00/39,00 gld.
33 Vinilkosmo-kompil' (KD/kasedo)	39,00/23,10 gld.
31 Mil unuaj vortoj en Esperanto, H. Amery	31,50 gld.
28 La nigra insulo, Hergé	18,90 gld.
24 Enciklopedieto de Ĉinio, komp. Li Qiang, Zhang Meizhi	19,50 gld.
24 Nova Esperanta krestomatio, red. W. Auld	57,00 gld. (5)
23 Kajto-kantlibro	30,00 gld.
22 ABC-Gramatiko de E-o, C. De Vleminck, E. Van Damme	65,40 gld.
21 Faktoj kaj fantazioj, M. Boulton	36,00 gld.
20 Nesto de viperoj, I. Nemere	18,00 gld.
20 Komputika leksikono, S. Pokrovskij	36,00 gld.
20 Mazi en Gondolando (instrua kompleto), W. Harris	189,00 gld.
20 Proverbaro esperanta, L.L. Zamenhof	18,00 gld. (20)
20 Esperanto kaj la estonteca plurlingvismo, intervjuo kun U. Eco	4,80 gld.

VENDOJ ENTUTE

282 Kalevala, trad. J.E. Leppäkoski	22,50 gld.
247 Asteriks kaj Kleopatra, Gosciny/Uderzo	16,80 gld.
231 Asteriks, la gladiatoro, Gosciny/Uderzo	16,80 gld.
190 Esperantaj sinonimoj, J. Ojalo	15,00 gld. (1)
186 Muminvalo, T. Jansson	18,00 gld.
173 Gerda malaperis!, C. Piron	7,20 gld. (3)
164 Pasporta Servo	24,00 gld. (16)
146 Saluton!, A. Childs-Mee	24,00 gld. (2)
126 Mil unuaj vortoj en Esperanto, H. Amery	31,50 gld.
116 La aboco de tempoplanado, L.J. Seiwert, W.U. Graichen	7,50 gld.
105 Faktoj kaj fantazioj, M. Boulton	36,00 gld. (8)
103 Etimologia vortaro de Esperanto N-R, E. Vilborg	33,00 gld.
94 Plena Analiza Gramatiko, Kalocsay/ Waringhien	48,00 gld. (5)
91 La nigra insulo, Hergé	18,90 gld.
83 Tohuvabohuo (KD/kasedo), Kajto	25,80/19,50 gld. (4)
89 La Sankta Biblio	24,00 gld. (18)
87 Nova Esperanta krestomatio, red. W. Auld	57,00 gld. (11)
80 Vinilkosmo-kompil' (KD/kasedo)	39,00/23,10 gld.
78 Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, T. Sekelj	15,00 gld.
76 La kunularo de l' Ringo, J.R.R. Tolkien	48,00 gld.
76 Winnie-la-Pu, A.A. Milne	27,00 gld. (12)

Reagoj



Pri movado

Ni ne flatu potenculojn

Laŭ la novaĵara mesaĝo de LEE Chong-Yeong (jan., p. 1), ni devas krei grupon de socie influaj homoj, kiuj ne parolas Esperanton sed ŝatas la ideon ligitan al la lingvo. Mi tute ne komprenas kial krei tian grupon. Ĉu mi nun, kiel prezidanto de mia E-grupo, komencu fi-flati la politikajn potenculojn de mia urbo? Ne, dankon, mi ne kunludas. Mi estas politika anarkiisto kaj malakceptis jam de longe la politikan karuselon de homoj kiuj laŭ profito iras de dekstro al maldekstro kaj reen. Mi estas krome konvinkita ke la politika mondo akceptos nin nur kiam ni montros nin granda, potenca grupo, kiu povus balote plialtigi ĝian potencon.

Tiuj kiuj ŝatas la ideojn de Greenpeace, ne malpurigu nian mondon. Ŝatantoj de la idearo de Amnestio Internacia ne malliberigu homojn. Tiuj kiuj ŝatas la ideon ligitan al Esperanto, lernu la ideon — kaj la lingvon, por ke ili pligrandigu la movadon, laŭ la regulo de kaŭzo kaj efiko.

Jacques Schram (Belgio)

Dubindaj CO-konsiloj

La Centra Oficejo donas du konsilojn al delegitoj: (“Uzo kaj misuzo de la Delegita Reto”, nov., p. 198): ke ili ne donu monon al petantoj sen informiĝi pere de la CO, kaj ke ili ne havas devon respondi al komercaj ofertoj. La unua konsilo estas ĝusta, sed oni devos plej rapide krei sistemon por efika helpo al esperantistoj, precipe al aktivuloj kaj al veteranoj de nia movado. La dua konsilo estas malutila por la Esperanto-movado. Kial? Ĉar ne respondi estas perdi okazon por reklami nian lingvon montrante ĝian utilecon. Al komercaj ofertoj oni ja respondu, mallonge sed precize, ke tio kostas kaj ke pri la problemoj fakuloj devus okupiĝi, ne senpage. Se la skribanto pretas pagi, bonvolu, karaj delegitoj, helpi kiel eblas — por via propra profito.

Aleksander Zdechlik (Pollando)

Ĉu ni postlumas?

Mi dankas al Martin Weichert (kaj lia entuziasma amiko Moldur) pro klara prezento de la nuna stato kaj eventuala estonteco de la informa ŝoseo en kaj ekster la E-movado (dec., p. 202). Tamen mi ne povas lasi sen komento ke la “esperantistoj postlumas la evoluon, kiel ĉiam”. Ŝajnas al mi ke la evoluo de la uzado de moderna tekniko pli-malpli paralelas en kaj ekster la movado. La listo de rete kontakteblaj e-istoj kreskas ĉiutage sed restas limigita — same kiel la nombro de rete kontakteblaj ne-e-istoj. Ĉu vere ni tiom postlumas? En mia ĉiutaga laboro mi spertis ke individuoj en pluraj gravaj instancoj simple ne estas rete kontakteblaj.

Sed certe restas grandaj taskoj antaŭ ni. Librokatalogoj, listoj de eventoj kaj revuoj devas esti alireblaj per la reto. Ni ne permesu ke ni postlamu!

Hilary Chapman (Britio)

□ bill.chapman@targed.org.uk

Pri lingvo

Ekspedo en malĝusta ujo

Ĉu niaj komputikistoj rezignis pri memstara kaj logika pensado favore al la de ili tiom ŝatataj aŭtomatoj? La artikolo “Virtuala realo” (dec., p. 202) donis al mi la impreson ke tio fakte okazis. Kvankam mi iom konas la Anglan* lingvon kaj komputoradon, kaj kvankam mi de 50 jaroj praktikas Esperanton, mi devis cerbumi por diveni kion intencis esprimi “komputiliĝo de Esperantujo kaj esperantiĝo de Komputilujo”. Ĉu “la lando en kiu loĝas Esperanto-parolantoj fariĝas komputilo; kaj iu ujo por komputilo(j) (la kartono en kiu ĝi estas ekspedata?) fariĝas Esperanta (Esperantlingva?)”? Pli verŝajne: “Komputorizo de la lando de Esperanto-parolantoj kaj konvertado de komputoroj por ke ili kapablu trakti Esperantajn tekstojn”. Mi estus danka se oni klarigus al la legantoj kion oni intencis esprimi.

Rüdiger Eichholz (Kanado)

*Rilate ĉi tiun majuskligon, la aŭtoro, akademiano, skribis: “Kvankam jam antaŭ multaj jaroj kelkaj kolegoj en la Akademio pledis ke oni skribu polnomojn kaj derivaĵojn de propraj nomoj per komenca majusklo, ili ne sukcesis ke la Akademio rekomendu tiun ortografion. Mi havas la impreson ke tiun malsukceson kaŭzis la redaktoroj de niaj revuoj, ĉar mi spertis ke ili arogis al si la rajton ŝanĝi la ortografion de kontribuoj al la malnova ortografio de ili preferata [kaj tiel] malhelpas pozitivan evoluon de nia lingvo.”

Finlando jes — Bharato ne! (daŭrigo kaj fino)

Mi dankas la novajn kontribuintojn (dec., p. 214) al la debato pri du landnomoj. Mia respondo estas tre simpla. Ne temas pri (mal)facileco de prononco por anoj de specifaj lingvoj. Temas pri la Zamenhofa atentigo (Respondo 56, *Oficiala Gazeto*, IV/1911): “ni devas elparoli ĉiun sonon severe aparte”. La literkombinoj [bh] kaj [nn] estas fremdaj al Esperanto, sed [sc] estas jam fundamenta. Jes, mi scias ke Zamenhof uzis la formon *Finnlando* aldone al *Finlando*. Li bonvolu reveni por fari definitivan decidon inter la du!

Ŝajne ges-roj Glossop kaj Pyhälä ne finlegis mian antaŭan leteron pri tiu temo, tiel komplikante la diskuton. Mi bone komprenas ke la finlandaj lingvoj estas la sveda, la suoma kaj la samea, same kiel la irlandaj estas la gaela kaj la angla.

Johano Rapley (Britio)

Bh = b+h

Volonte mi akceptus *Barato*, se tiu vorto estas preferata ĝenerale en tiu subkontinento; reciproke ne ĝenus min la forigo de *c* en *scienco*, *scii* k.s. P. Daŝgupto tamen erare egaligas la du kazojn. *Sc* estas prononcebla, ĉar *s* estas daŭre parolebla, samkiel vokalo, sed *bh* ne egalas al *b + h*, ĉar *b* estas plozivo. Laŭ mia kompreno, *bh* reprezentas alian konsonanton.

Ian Fantom (Britio)

Ĉiuj veraj esperantistoj
abonas al la plej ofta E-gazeto

EVENTOJ

Ĉu ankaŭ vi?

pk 87, HU-1675 Budapeŝt, Hungario



• Eŭropa agado: Aŭskult-kunsido

Reprezente de la laborgrupo pri la lingvoproblemo en EU, Hans Erasmus ĉeestis aŭskult-kunsidon por neregistartaraj organizoj en la Eŭropa Parlamento (26-27 feb., Bruselo) kaj disdonis dokumenton laŭ kiu “kiel dua lingvo apud la gepatra, neŭtrala lingvo garantios la lingvan diversecon, plibonigos la komunikadon, [kaj] evoluigos la eŭropan dimension en edukado cele al pli forta eŭropa civitaneco”.

• Junularo: Sinjoro Eŭropo

Elektita al grava ekstermovada posteno la 8-an de marto, la 22-jara germana TEJO-aktivulo Ralf Fröhlich fariĝis nia “sinjoro Eŭropo”: li elektis prezidanto de Eŭropa Kunordiga Buroo, la plej grava tegmenta organizo de eŭropaj junularaj asocioj.

• Komputado: Alia Golden

La decembran numeron de *Golden Mac*, franca revuo por Makintoŝ-uzantoj (pli ol 30 mil ekz.), akompanas kompakt-disko kun i.a. prezento de Esperanto fare de Klivo Lendon. Mendebla ĉe: *Golden Mac*, Cedex 65, FR-92051 Paris-La Défense 5. (P. Berizzi)

• Lingvopolitiko: En eŭropa kadro

En la seminario “Esperanto enkadre de eŭropa politiko” (9-10 dec., Ham-

burgo) Frank Stocker kaj Ulrich Brandenburg prelegis pri la ĝenerala politika situacio en EU kaj la stato de la eŭropa integriĝo. Werner Bormann raportis pri la laborgrupo kiun Emma Bonino starigis por studi la kostojn de multlingveco en EU, kaj kies ekspertizo estos preta meze de 1996. Detlev Blanke emfazis ke, antaŭ ol agi Eulingvopolitike, necesas pli da fakkono kaj unueca strategio ene de la movado. (*Esperanto aktuell*)

• Muzeoj: Du pacejoj

La UN-broŝuro “Pacmuzeoj tutmonde” prezentas 50 tiajn instituciojn, “simbole po unu por la pasintaj 50 jaroj”. Inter ili aperas Internacia Esperanto-Muzeo de Vieno kaj Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco en Samarkando (Uzbekio). La klubo de ĉi tiu urbo (Pk 76, UZ-703000 Samarkand) invitas kontribuojn al sia internacia letervespero en aŭgusto, okaze de la 660-a datreveno de Amir Timur (Tamerlan) kaj la kvinjariĝo de la uzbekia sendependeco. Materialoj pri ĉi tiuj du temoj estas aparte bonvenaj.

• Pupteatro: E-tago en Budapeŝto

Esperantan tagon kadre de la internacia pupista festivalo UNIMA '96 malfermos la 29-an de junio, en la Hungara Nacia Muzeo, jubilea labor-kunsido de Internacia Ligo E-ista de Pupistoj, fondita antaŭ 30 jaroj, dum la 51-a UK en Budapeŝto (1966). Eparolantaj deĵorontoj kaj prezentiĝemaj pup-amatoroj anoncu sin al Erzsébet Regőczy, Sörház u. 4, HU-1056 Budapest. (*Kooperativa Stelo*)

• Tradukado: Ruse, malte, rumane

Gazeto en Leninsk-Kuzneckij (Rusio) aperigis felietone tradukon de Miĥail Korotkov el la romano *La fermita urbo* de István Nemere.

Same felietone, la malta studenta revuo *Saghtar* publikigis ekde oktobro la romanon *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* de Tibor Sekelj, en traduko de Carmel Mallia. (*Mezmara Stelo*) Lastatempe Mallia estis televide intervjuita, de malta akademiano, pri sia maltlingva Zamenhof-biografio (1994).

Post la rumanigo de *La nova realismo* de Bruno Vogelmann, aperis en la rumana *La miraklo de la 20-a jarcento* de Masayuki Saionji, ambaŭ en Timișoara. (*Bukureŝta Informilo*)

• Turismo:

Broŝuroj kaj prospektoj

Du koloraj broŝuroj pri la itala regiono Trentino aperis (tr. M. Bezzi) ĉe loka turisma instanco. (*Heroldo*)

El Norvegio ne plu dissendiĝas la nun eksdata 16-paĝa informilo en Esperanto, sed ja belaspekta plurkolora informfolio de la ministerio pri eksterlando, *Norvegio ekrigarde*, mendebla pere de ĉefdelegito Kjell Gustavsen (Rasmus Engersvej 10, NO-09596 Oslo 9). (*Norvegia E-isto*)

Okaze de la miljariĝo de Zagrebo, la urba turisma asocio eldonis prospekton ankaŭ en Esperanto (tr. Lucija Borčić), kiun distribuas Kroatia E-Ligo.

• Universitatoj:

Premiero en Valencio

La unuan fojon en la Universitato de Valencio (filologia fakultato) komenciĝas Esperanto-kurso en aprilo. Instruas Augusto Casquero de la Cruz, LKK-estro de la 78-a UK en Valencio. La studentoj ricevos por la kurso oficialajn poentojn kaj atestilojn.

Casquero gvidas ankaŭ tutjaran E-kurson de lernejo por konstanta edukado de plenkreskuloj. (G.C. Fighiera)

• ZEO-j: Gratulu urbestron

La franca urbo Aix-en-Provence riĉiĝos la 4-an de majo per impona Zamenhof-monumento. Por montri la tutmondan viklecon de Esperanto kaj por doni internacian dimension al la evento, la loka klubo alvokas sendi gratulajn kaj dankajn leterojn, **nepre antaŭ la inaŭguro**, al la urbestro: M. Jean-François Picheral, Maire d'Aix-en-Provence, Hotel de Ville, FR-13100 Aix-en-Provence. Skribu en via gepatra lingvo kun Esperanta traduko.

Helpu malĉesigi Budapeŝtan radion

La Esperantaj elsendoj de Hungara Radio por enlandaj aŭskultantoj ĝis decembro daŭris duonhoron, poste jam nur 10 minutojn semajne. Ekde la 4-a de marto oni eĉ nuligis la elsendon, oficiale por ŝparo — preteksto neakceptebla ĉe programo kies jaraj kostoj sumiĝas je 300 mil forintoj (ĉ. 3300 gld.). Aktivuloj ĉirkaŭ la teamo de *Eventoj* organizis protestkampanjon, sekve de kiu venis plurcent leteroj al la radia estraro, kaj pluraj E-organizoj turnis sin al la kulturministerio. La 4-an de marto cento da homoj manifestaciis antaŭ la Radio kontraŭ la decido, emfazante ke la E-lingvaj elsendoj simbolis la lingvan demokration en Hungario. Raportis pluraj radiostacioj kaj ĵurnaloj. Rezulte de tiuj agoj, Hungara Radio paŝon post paŝo retiriĝas. Komence la vortuzo ŝanĝiĝis de “nuligo” al “provizora ĉesigo”, kaj post la manifestacio menciĝis jam ebla restarto en somero.

Por ke la promesoj ne restu vanaj, necesas translima reago. Skribu ĝentilan protest-leteron al la hungara ambasadoro en via lando. Kaptante la okazon, petu ke la Budapeŝta E-programo estu aŭskultebla ankaŭ pere de kurtondoj kaj satelitoj, pli longe kaj pli ofte.

László Szilvási (Hungario)



kontribui al la interproksimigo de la popoloj kaj ke ĝi estas komunikilo ebliganta ŝirmi la naciajn lingvojn ne privilegianta iun pli ol la aliajn”.

Ankaŭ en la raporto de la kongreso “Eŭropaj civitanoj morgaŭ: civitaneco konstruenda hodiaŭ” (Lille, 9 nov.) legeblas sam-enhava alineo, dank’ al alparoloj de Claude Leriche kaj Claude Longue-Epée. (*Norda Gazeto*)

• Hungario: Freinet-magazino

La hungara Freinet-movado ĵus eldonis la 30-an numeron de sia magazino *ALT-MAG*, kiun kunredaktas pluraj esperantistoj, i.a. Gabriella Ósz

ĵeras “René Ramos Latour”, Departamento de Otros Idiomas, Calle 19 de Mayo esquina a Ayesterán, Plaza, Ciudad de la Habana. (J. L. Besada)

En Santa Cruz del Norte pasintjare oni malfermis Esperantan Amuzkomputilan Metiejon, kie 9 geknaboj ek-lernis Esperanton per komputilaj ludoj. Pro la sukceso, venis pluaj 7-14-jaruloj, kaj nuntempe oni instruas trifoje semajne. (*Heroldo*)

Membro de la filio de Kuba E-Asocio en Sancti-Spíritus, Luis Padrón Luna, ekfunkciigis drinkejon kun la Esperanta nomo La Domo de la Lumo. (*Jajabo*)

• Aŭstralio: Instrusperto en Perto

Financate de fonduso por E-instruado en lernejoj (kreita plej grandparte de Idyss Einihovici), Trevor Steele instruas Esperanton ekde la komenco de la lerneja jaro ĉe tri Montessori-lernejoj en Perto (Perth) al pli ol ducent infanoj inter 3 kaj 12 jaroj. En unu lernejo ankaŭ la instruistinoj ricevas lecionojn, kaj en dua oni okazigos kurson por gepatroj. Pluaj Montessori-lernejoj interesigas pri la enkonduko de E-kurso. (T. Steele)

• Belgio: Tajphelpu laborpartion

La Belgia Laborpartio unuafoje disdonos Esperantan version de la dokumentoj en sia tradicia internacia seminario je la 1-a de majo. Bonvolaj enkomputiligintoj de la koncernaj E-tekstoj anoncu sin al BLP-Amikaro, 171, Bd. Lemonnier, BE-1000 Bruxelles; ☎+32/2/513-98-31; ✉solidaire@gn.apc.org.

• Filipinoj: Asocio

Je la instigo de Ghulam Nabi Parvaz el Pakistano, fondiĝis Filipina E-Asocio. Ĝin prezidas Teng S. Uban (Shariff Kabunsuan College, PH-9600 Cotabato City), ĝis nun sola UEA-membro en Filipinoj. Libro kaj alia helpo estas bonvenaj ĉe lia adreso. (*Esperanto en Azio*)

• Finnlando: Naci-nivelaj novaĵoj

Okaze de la Vintraj Tagoj de E-Asocio de Finnlando (23-24 feb.), la finna novaĵagentejo STT informis pri la aranĝo, pri la tiea prelego de EU-oficisto Brian Moon rilate la lingvan situacion en EU-instancoj, kaj pri la pozitivaj eldiroj de Emma Bonino koncerne Esperanton (marto, p. 42). La STT-informojn diskonigis pluraj gazetoj, la televidaj tekstoj-novaĵoj kaj la nacia radio. (K. Kniivilä, J. Pietiläinen)

• Francio: Favoraj rezolucioj

Post disdono de flugfolio pri Esperanto, la 500 ĉeestantoj de sindikata kongreso departementa (Douai, 2 dec.) akceptis rezoluciojn, laŭ propono de Claude Leriche, ke “Esperanto povas



• Ganao: Cseh-instruo plu

Post la vizito de Cseh-instruisto Atilio Orellana Rojas, antaŭ unu jaro, multajn homojn instruas Cseh-metode la 21-jara Yaw Ampomah Badu Frempong (Presby Training Coll., Birim R3, P-2B, P.O.Box 64, Kibi E/R, Ganao), kiu volonte akceptas librohelson. Jen liaj kursanoj.

kaj Ilona Sirkó. La magazino plurloke mencias Esperanton favore, kaj felietone publikigas la bazan Freinet-verkon, *La diroj de Mateo*, en el-Esperanta traduko de Ósz. (*Kooperativa Stelo*)

• Kubo: 30 A-kategorianoj

Pasintjara komitatkunsido de Kuba E-Asocio en Camagüey aprobis starigon de diversaj membrokategorioj en KEA. “A-membroj” — kiuj nun nombras 30 en la insulo — devas bone scipovi la lingvon, esti informitaj, kaj aktivi de almenaŭ 5 jaroj. (*Jajabo*)

Post plurjara strebado, KEA atingis enkondukon de baza E-kurso ĉe la Universitato de Havano. Ekde oktobro Clara Lastres Gutiérrez kaj Juan Lázaro Besada instruas 15 kursanojn. Ĉiaj studmaterialoj, legaĵoj ks. bonvenas ĉe: Facultad de Lenguas Extran-

• Rusio: Kalendara ĝustigo

La ĝustaj datoj kaj kontakt-adresoj de la E-renkontiĝoj “Blankaj noktoj” (Sankt-Peterburgo, Rusio) estas: 28 jul. – 5 aŭg. (Svetlana Ejst, ul. Partizana Germana 15-1-98, RU-198329 Sankt-Peterburg), kaj 8–12 jul. (“Universo”, a/k 130, RU-197022 Sankt-Peterburg; ✉alex@asisto.spb.ru).

• Slovenio: Ŝtata subteno

La ministerio pri scienco kaj teknologio financas trijaran esplorprojekton ĉe la Universitato de Ljubljana pri preparlaboroj por la Esperanto-slovena kaj slovena-Esperanta vortaroj.

Vizitu Maastricht Esperanto-Domon: tranoktado 35 gld pp; fakso/tel +31-43-213.247; retpoŝto Adriaanse@GVO.RuLimburg.nl.

Vasile ALBU (1927-1995), delegito pri kemio, unu el la plej aktivaj esperantistoj en la lastaj jardekoj en Rumano, mortis la 21-an de decembro en Sibiu, la naskurbo de la Cseh-metodo, kie li fervore instruis la lingvon.

Paulette BASCOU (1909-1995), Freinet-metoda E-instruintino, delegito pri edukado dum kvaronjarcento, aktiva en la movado JEAN, forpasis la 27-an de decembro en Privas (Francio).

Gerard ELLERMAN (1913-1995), esperantisto ekde 1933, aktiva en katolikaj kaj Amsterdamaj E-rondoj, sekretario de nederlanda ekzamena komitato, delegito pri katolikismo 36 jarojn, mortis komence de novembro.

Jack HEATH (1904-1995) mortis la 6-an de majo 1995 en Ipswich (Britio). UEA-membro dum duona jarcento, delegito pri instruado pli ol tri jardekojn, li organizis la 3-an Internacian Junularan Kongreson en Ipswich (1947) kaj aranĝis korespondajn kursojn.

KURODA Masayuki (1909-1996) forpasis la 2-an de februaro proksime al Osako. Laborante ĉe Oomoto, li lernis Esperanton de Jozefo Major en 1931 kaj esperantistiĝis en 1949. Li gvidis kursojn, aktivis en Osaka E-Societo (prezidanto 1962-70, honora membro de 1980) kaj en Kansaja Ligo de



KURODA Masayuki

E-Grupoj (vicprezidanto 1974-81). Kuroda riĉigis nian beletron per utaoj originalaj kaj tradukaj (*Lazur' kristala kaj pluv' susura*, 1978) kaj per la aŭtobiografia romano *Animo drivas* (1990). Reprezentita per du poemoj en *Esperanta Antologio*, li premiigis dudekon da fojoj en poeziaj konkursoj, i.a. kvarfoje en la Belartaj.

Tinka LAKOVA (1907-1995), honora membro de Bulgara E-Asocio kaj gvidinto de ties Virina Sekcio, parolisto de la iamaj E-elsendoj de Bulgara Radio, forpasis decembre en Sofio.

Ivar PAULSSON (1915-1995), prezidanto de E-Ligo Filatelista, delegito pri filatelo, SAT-peranto en Svedio

dum pluraj jardekoj, multjara pri-zorginto de la libroservo de Sveda Laborista E-Asocio, mortis en Solna la 10-an de decembro.

Milivoje PAVLOVIĆ (1907-1995), esperantisto ekde 1930, kursgvidinto, mortis antaŭ nelonge en Beogrado. Li iniciatis kaj kuntradukis *Antologio de la serba parola literaturo* (1991). Liaj poemoj aperis en la antologio *Reeĥoj* (1961).

Kalina PIENKIEWICZ (1935-1996), aktorino de Pola E-Teatro Grabowski (1971-80), kiu turneis tra Eŭropo kaj Ameriko kaj prezentigis en UK-oj, mortis en Varsovio la 6-an de marto. Ŝi tradukis *Feliĉa evento* de Mrozek, prezentitan en la Varsovia UK (1987), por kies LKK ŝi servis kiel arta konsilantino. Laste ŝi donis voĉon al la reĝino de *Mazi en Gondolando*.

Jean SEGUIN (1922-1995), konata aktivulo en Cébazat (Francio), mortis la 14-an de julio.

Lev Mihajloviĉ ZAMENHOF (1920-1995), nepo de kuzo de L.L. Zamenhof, kolonelo de la sovetia armeo, mortis la 26-an de januaro 1995.

Pierre ZANIN (1921-1995) delegito en Mel (Italio) pri instruado, ĝardenoj kaj universala kalendaro, E-instruanto, forpasis la 2-an de septembro.

OFICIALA INFORMILO

PATRONOJ DE TEJO 1996

Aŭstralio: Idyss Einihovici. Brazilo: José Passini. Francio: Barbara Despiney; Jeanne-Marie Cash; Gustave Blary; Henri Roy; Jean-François Clet; Maurice Feneyrol; Hervé Mougin; Pierre Cheynet; Raymond Despujols; René Villégier; Renée Triolle. Germanio: Nora Caragea; Thomas Bormann. Japanio: Joel Brozovsky; Gwenda Sutton; Yosiki Tatumi. Korea Resp.: d-ro LEE Chong-Yeong. Nederlando: W.F. Huppertz.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Aŭstralio: Keppel E. Enderby. Belgio: Jean P. Bovy. Brazilo: Alvaro Rabelo. Danio: Ejnar Hjorth; Ole Therkelsen. Francio: André Loisel; Denise Loisel; Pierre Guérout; Henri Roy; Jean-François Clet; Jean Gibaux; Jeanne Roy; Jeanne Vincent; Lucien Guerry; Maurice Feneyrol; Tadeusz Nowak; Pierre Métivier. Germanio: Eva Bork; Heinrich Nischwitz. Hispanio: Josep Franquesa Solé. Italio: Clara Gubbioli Carioli. Japanio: Mituo Gotou; Kōiti Simizu. Korea Resp.: CHOI Yun-huy; d-ro LEE Chong-Yeong; Yung-myung Kim. Nederlando: A.J. Bakker-ten Hagen; Dini Kappert; Hans Bakker; Willem P. Roelofs. Norvegio: Olav Bjørnsrud. Slovenio: Jožica Zidanik. Svedio: Harald Andersson; Jack Snarberg; Lennart Svensson; Leif Holmlund;

Nils Gustav Johansson. Svislando: Furio Gabrielli. Usono: Arnold Victor.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Danio: Grethe Kvist. Francio: Philippe Chavignon; Denise Loisel; André Loisel. Koreio: Han-u Im. Rumanio: KIM Chaegon.

DONACOJ 1996 (gld.)

ĝis la 29-a de februaro

Fondaĵo Afriko: Anonima 3230,47. Anonima 100,00. Memore al E. Symoens 472,92. Britio: P. Danning 100,00; B. Phillips 37,90. Francio: Dequaire 66,00. Nederlando: H. Bakker 34,00; Urbo Voorburg 500,00. Sumo ĉi-jara 4602,36. Fondaĵo Azio: Anonima 3135,00. Sumo ĉi-jara 3135,00.

Fondaĵo Canuto: Britio: R. Smith 17,57. Francio: R. Despujols 65,20; P. Du Chevron 257,54; R. Lebrun 32,60; T. Nowak 97,80; B. Robineau 29,34; M. Schmidt-le-Roi 32,60; A. Tailpied 32,60. Japanio: H. Gotou 61,80; Hayasi Ken 30,90; Hayasi Kaneyuki 30,90; M. Isino 61,82; T. Itabasi 30,90; R. Karibe 77,25; T. Koyama 30,90; R. Morita 30,91; S. Nagura 92,70; T. Nisitani 30,91; T. Oohara 30,90; H. Tai 30,90; A. Tai 30,90; Y. Tanaka 46,35; H. Tani 30,90;

K. Tutiya 30,90. Nederlando: A.J. Middelkoop 500,00; F.J. Pieterse 50,00. Norvegio: A. Ryen 46,22. Svislando: C. Sixtus-Pot 32,03; E. Walder 52,93. Diversaj malgrandaj: 1,59. Sumo ĉi-jara 3111,52.

Generala Kaso: Britio: J.H.R. Marns 50,20. Germanio: H. Neumann 14,56. Svislando: D. Bühlmann 69,65; H. de Sassi-Reber 11,14; W. Giannini 32,04; W. Läderach 12,54; F. Liechti 12,54; P. Rüegg 32,04. Usono: C. Tucker 16,66. Diversaj malgrandaj: 24,29. Sumo ĉi-jara 3649,13.

Konto Espero: Francio: J-F. Clet 149,96; R. Deneu 32,40; R. Despujols 65,20; R. Durand 32,60; C. Haren 64,80; H. Mougin 35,67; A. Tailpied 32,60. Sumo ĉi-jara 994,30.

Propaganda Konto: Italio: S. Delcarmine 16,81. Sumo ĉi-jara 16,81.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Anonima: 1000,00. Britio: A. Vincent Jones 19,00. Germanio: A. Hanke 20,00. Kroatio: S. Bokulić 76,95. Urugvajo: J.F. Valim 78,67. Sumo ĉi-jara 1537,62.

Volontula Fondaĵo: Britio: A. Vincent Jones 19,00. Irlando: M. Mullarney 25,00. Sumo ĉi-jara 74,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA



**SOMERMEZAJ
ESPERANTO-
STUDSEMAJNOJ
EN FINNLANDO
1996!**

AAA

En Tampere (Virrat) 24.-28.6.1996 kaj en Jyväskylä 1.-5.7.1996. En ambaŭ studsemaĵoj instruos konata Esperanto-pedagogo, Stefan MacGill el Hungario.

La 3a Esperanto-semaĵo de Tampere.

La kursloko estas la moderna Internacia Junulara Kurscentro de Marttinen en Virrat, ĉ. 100 km-ojn norde de Tampere. Okazos duniĉelaj Esperanto-kursoj, instruos ankaŭ Pentti Järvinen (Finnlando).

Samtempe okazos kaligrafio-kurso per Esperanto; la instruisto estos Gennadi Leontjev (Finnlando/Estonio).

Ni ankaŭ havos eblon ekzerci padeli en rapidfluo kaj konatiĝi kun finnaj tradiciaj loĝejoj en muzeovilaĝo ĉe la kursejo.

Pliaj informoj kaj aliĝadreso: Esperantosocieto Antaŭen, Teivaalantie 85, FI-33400, Tampere, Finnlando. Tel. +358 31 3463 493.

Verda Aventuro – tradicia somera studsemaĵo en Jyväskylä, jam la 28a.

La ĉi-jara temo estas naturo, kaj ni garantias kompetentan instruadon, variajn tagajn temojn kun ekskursoj kaj multflankan vesperan programon.

Bonvenon al novaj kaj malnovaj geamikoj por pasigi unu someran semajnon en la lagoriĉa Mezfinnlando.

Petu pliajn informojn: Esperantoklubo de Jyväskylä, s-ino Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, FI-40630 Jyväskylä. Tel. +358 41 254 609.



Pasintjare 270 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

En unu jaro tiu nombro preskaŭ duobliĝis. Aliĝu ankaŭ vi al la plej rapide kreskanta klubo de la Movado! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



Edward Symoens:

BIBLIOGRAFIO DE DISERTACIOJ PRI ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO



Tiu ĉi grava informfonto (1989; 159p.) estas nun ĝisdatigita per 63-paĝa suplemento. Kune ili priskribas preskaŭ 250 universitatajn studojn.

Baza libro 21,00 gld.; suplemento 7,20 gld. *Oferto:* Ambaŭ kune 23,50 gld.

Valora plilongigo de la Praga UK

Unutaga ekskurso de Prago al Suda Bohemio

Svatá Hora (baroka monaĥejo) – České Budějovice – Hluboká:

ĉarmaj kasteloj, en unu el ili kultura programo.

1996-07-19 kaj 1996-07-28 (la sama programo).

94 gld. (post 1996-05-31: 104 gld.), eblo pagi pere de UEA-konto “kava-p”. La prezo inkluzivas: busvojaĝon, tag- kaj vespermanĝon, enirbiletojn, kulturen programon, profesian E-lingvan ĉiĉeronon.

Pli da informoj kaj aliĝiloj: KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Praha), Tel.: ..42.2.991 2201, Fakso: ..42.2.991 2126.

Daŭra oferto de KAVA-PECH:

- Turismaj servoj por grupoj kaj individuoj en Prago kaj en tuta Ĉeĥio (tranoktado, ekskursoj, fakaj aranĝoj, vizitoj de bierfabrikoj, aranĝo de festenoj, ...).
- Jam 29 titoloj de propra eldonejo (ankaŭ en Esperanto).

La Kosmologio de Martinus

Esperanto-semaĵo

11a - 17a de aŭgusto 1996 en Danio

La kosmologio montras ke ekzistas psikaj naturleĝoj pri pensado. Scio pri tio ebligas al la homo ekregi sian menson kaj future krei mondregnon surbaze de kosma logiko kaj humanismo. Petu senkostajn broŝurojn kaj provekzempleron de la revuo KOSMOS ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio.

☎ +45 3834 6280 – Fakso +45 3834 6180

Nenia unuiĝo aŭ membreco

Alain Fournier

La granda Meaulnes

**Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.**

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.

NANDIR FILMREALIGOJ
CP 1258 - Lausanne - Suisse

Laŭzana Esperanto-Societo
PK 389 - 1009 Pully - Svislando

**...proponas al vi tri novajn
vidbendojn...**



La laŭzana polico
... prezentas sin

Pro siaj 126000 loĝantoj, la ĉefurbo de la Vaŭda kantono staras hodiaŭ je la kvina vico inter svisaj loĝlokoj. Laŭzano nombras 380 policistojn. (30 min.)



LA EGA KESTETO
POLICA FILMO 7-LINGVA

Ĉi tiu scenara polic-filmo, en kiu aŭdiĝas 7 lingvoj, inkluzive de Esperanto, ilustras aspekton de la nuna vivo en Svislando, kie komunikado ofte okazas miks- kaj mis-lingve. Tiu fikcia filmo ricevis la duan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1995. (30 min.)



TAMPEREO 1995
Kongresa filmo

Dum la UK 1995 en Tampere (Finnlando), la kameraisto filmis la ĉefajn partojn. Li muntis ilin senkomente; la bildoj kaj etoso parolas per si mem. (60 min.)

(Ne forgesu precizigi la sistemon de via aparato: PAL, SECAM aŭ NTSC.)
La vidbendoj estas mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA.
Prezo de unu kasedo: 66 gld. Prezo de la 3 kune: 180 gld.
Aldoniĝas 10% por sendo kaj, en EU, 17,5% por imposto.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŬIARTO

estas gazeto
por ĉiu, kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KŬIARTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1996 **KŬIARTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugaliao	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

KOMPLETIGU VIAN KOLEKTON.

Revivu historiajn
momentojn de
nia movado.

Mendu malnovajn
numerojn de *Esperanto*.

Estas ankoraŭ haveblaj
numeroj el la jenaj
jarkolektoj:

1980-1991	po	1 gld.
1970-1979	"	2 gld.
1960-1969	"	3 gld.
1950-1951	"	4 gld.

Sendokostoj aldoniĝas.

La 83-a Japana Kongreso en Hiroŝima

Dato kaj Loko

9-11 aŭgusto 1996. Hiroŝima, Japanio
(Vi povos partopreni post Komuna Seminario, kiu okazos
6-9 aŭgusto en Okayama.)

Kongresejoj

Hiroŝima Internacia Konferenc-Centro

Antaŭ la stacio Hiroŝima startas tramo al "Miyajima"
kiu haltas tuj antaŭ la kupolo "Genbaku-Doomu-mae"
15 min. for de la stacio. La kongresejo staras en la Pacparko.
Hotelo Makoto, kiu situas sur la insulo Miajima
Post la 6-a ptm. de la 10-a sabate ĉio okazos ĉe la hotelo,
kiu estas ankaŭ la loĝejo de la kongreso.

Kotizo

10 000 enoj (inkluzivas 2 tranoktojn, 3 manĝojn, bankedon
kaj foton)

Alĝimaniero

Sufiĉas sendi bazajn informojn: nomo, sekso, nacio, kaj la
dato kiam vi venos. Vi pagos kotizon ĉe la akceptejo de
la kongresejo.

Organizanto

La Hiroŝima Komitato de la 83-a Japana Esperanto-Kongreso
Hiroŝima-si, Minami-ku, Oogonzan-tyo 7-15, 734 Japanio
Telefono kaj fakso: +81-82-286-2745